


EL POPOLA ĈINIO

中國報道

6 1984





La putobora platformo "Nanhaj n-ro 3" en laboro



La putobora platformo "Nanhaj n-ro 1" prospektoranta ĉe Jinggehaj

Olekampo en Ĉina Maro

Bv. legi la artikolon "Petrola Bazo en la Suda Ĉina Maro" en tiu ĉi numero.

Fotoj de ĈEN ŜJŬESI, HŬANG




La doko de Ĉiŭan ĉe Ŝekoŭ en Ŝenĝen, kie oni povas ankri 10 000-tonelajn ŝipojn



a Suda

JANČIŪ kaj ŠJŪE ČAŪ



Boristoj laborantaj sur platformo






Komputera centro en la petrola bazo

Moderna kalkpulvoro-blova ekipaĵo





Laborantoj mezurantaj oleon, gason kaj akvon kaj kolektantaj specimenojn



Ĉina kaj franca laborantoj kune kolektantaj specimenojn de oleo





Laborantoj studentaj putoboran planon

Loĝkvartalo de eksterlandaj laborantoj en la petrola bazo



Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Altprodukta olea kaj gasa puto
borita de Ĉinio kaj Francio en
Bejbu-golfo en la Suda Ĉina Maro

SUR LA DORSKOVRILO:

Fazanoj en ruĝa foliaro (Ĉin-
stila pentraĵo)

de **U DONGKUJ**

KOLORAJ SERIOJ:

Olekampo en la Suda Ĉina Maro
La tri gorĝoj de Jangzi-rivero
Fotoj faritaj de esp-istoj
Sude kaj Norde de la Granda
Muro (6): Tri pasejoj en Ŝanŝji-
provinco

Ksilografajoj de Mo Ce

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Siŭ Jujĝjŭan kaj ŝia studo de
mikrocirkulado

La Junnan-a Observatorio

Petrola bazo en la Suda Ĉina Maro	2
Sude kaj Norde de la Granda Muro (6): Tri pasejoj sur la Leŭsa Altebenaĵo	50
KURANTAJ AFEROJ	5
Vankuvero — gemo ĉe Pacifiko	8
POR KOMENCANTOJ: Arbego kaj arbeto; Vulpo kaj simio	11
ESP-NOVAĴOJ	9,12
Kampanoj post riĉiĝo	17
Por savi dronantan knabon	19
MIA VIVO: Mi ne estas la plej bona	21
Ŝi kaj estonta medicino	14
Bazo de astronomia observado en suda Ĉinio	35
POR VIA SANO: Gimnastiko por kuraci bronkan astmon	30
Ili partoprenos en la Olimpikoj	24
Prikantanto de la naturo	31
Ŝaŭŝing-vino	33
VIDINDAJ LOKOJ: La pitoreskaj Tri Montgorĝoj	27
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La fondiĝo kaj pereco de la Suda Song-dinastio	38
Ceramikaj kaj porcelanaj muzikiloj de la antikva Ĉinio	40
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Kvar specoj de skribiloj de Ĉinio	47
Monumento de amikeco en la koro	42
ĈINLINGVA KURSO: Sesa leciono	45
INTER NI: Granda kuraĝigo	48
KORESPONDI DEZIRAS	29

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugaliŝo	Esc.	500.00	
Aŭstralio	\$A	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00	
Aŭstrio	Sch	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00	
Belgio	BF	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50	
		Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00

Petrola bazo en la Suda Ĉina Maro

EN la lastaj jaroj Ĉinio malkovris grandan rezervon da marfunda petrolo en la Suda Ĉina Maro. Tio vekis atenton de la ĉinoj kaj alilandanoj, kiuj interesiĝas pri la problemo de la monda energio. Nemalmultaj el ili faris taksadon de la petrola situacio. Ankaŭ multaj el niaj legantoj demandis, kiaj estas oleaj riĉfontoj en la Suda Ĉina Maro kaj kiel iras la esplorado de la loko. Pro tio mi vizitis la bazon de la petrola kompanio de la okcidenta parto de la Suda Ĉina Maro, en

la orienta antaŭurbo de Ĝangĝang, la plej grandan petrolan servobazon ĉe la maro.

RIĈAJ OLEKAMPOJ SUR MARFUNDO

Jam antaŭ pli ol 100 jaroj ĉinaj fiŝistoj rimarkis gasan ellason ĉe pli ol 30 lokoj de la vasta Suda Ĉina Maro. En 1957 ĉinaj petrol-teknikistoj prospektoris 36 ole-emergajn punktojn ĉe Jinggehaj en la maro. En la komenco de la sesdekaj

Ĉina kaj franca boristoj en laborado



jaroj ili faris tie ĝeneralan esploradojn kaj aviadan magnetomezuradon de oleaj kaj gasaj riĉfontoj. Granda kvanto da materialoj akiritaj de ili pruvis, ke sur la kontinenta breto en la norda parto de la Suda Ĉina Maro sidas ĉefe tri grandaj sedimentaj basenoj riĉaj je oleo kaj gaso, nome tiu ĉe la enfluejo de la Perlo-rivero, tiu en Bejbu-golfo (Bak Bo) kaj tiu ĉe Jinggehaj, kun totala areo de ĉ. 250 000 kvadrataj kilometroj.

Laŭ sia petrol-geologia strukturo la tri basenoj havas dikan sedimentan tavolon riĉan je petrolo. Preskaŭ ĉiuj surmaraj esplor-putoj montris oleon kaj gason. El iuj eĉ abunde ŝprucis olea kaj gasa fluo. La fakto per si mem diras, ke la Suda Ĉina Maro estas unu el la plej promesplenaj maroj en la mondo, kiujn oni prospektoras por petrolo.

Por bone ekspluati olekampojn en la Suda Ĉina Maro, oni fondis en junio 1983 la petrolajn kompaniojn de la orienta kaj okcidenta partoj de la Suda Ĉina Maro sub la Ĉina Ĝenerala Marpetrola Kompanio. La petrola bazo de Ĝanĝjang faras ne nur diversajn servojn al la petrola kompanio de la okcidenta parto de la Suda Ĉina Maro, sed ankaŭ teknikajn laborojn kaj labor-kontraktojn ĉe la marbordo de Ĝuangdong-provinco, kiel difino de pozicio kaj borado de oleputo. Antaŭe tiu bazo estis malgranda salejo, 12 km. longa kaj unu km. larĝa. Sed oni jam konstruis tie komputeran centron, ofidomojn de alilandaj kompanioj, riparejon, tenejon de materialoj, dokon por aparta uzo kaj kvar loĝkvartalojn kun 20 000 laboristoj kaj iliaj familianoj el diversaj olekampoj de la lando.

KUNLABORO KUN ALIAJ LANDOJ

Ekspluato de maraj oleaj riĉfontoj bezonas altan teknikon kaj grandajn kapitalojn. Por akceli la ekspluatadon, Ĉinio kontraktis de post 1979 kun pli ol 40 petrolaj kompanioj de 12 landoj pri geofizika prospektado de la Suda Ĉina Maro kaj la suda parto de la Flava Maro. Ĉinio kaj aliaj landoj kunlabore finis mara-geologian esploron pri 87 000 km. da sismologiaj mezuroj sur la Suda Ĉina Maro. Komence de 1982 la Ĉina Marpetrola Kompanio prezentis sian unuan kontraktan proponon por mar-petrola kunlaboro kun aliaj landoj. En 1983 Ĉinio subskribis 18 kontraktojn kun alilandaj entreprenistoj por kune prospektori kaj ekspluati marajn oleajn riĉfontojn.

Inter la plej fruaj eksterlandaj kunlaborantoj de Ĉinio troviĝas la Totala Petrola Kompanio de

Francio. Post intertraktado en 1980 Ĉinio kaj Francio kontraktis kunan prospektoradon kaj ekspluatadon de la oleaj riĉfontoj kovrantaj 10 100 kvadratajn kilometrojn en Bejbu-golfo en la Suda Ĉina Maro.

En la ofidomo de la Ĝanĝjang-a Esplora Branĉo sub la Totala Petrola Kompanio de Francio mi vizitis ĝian francan direktoron P. Picard. Li diris al mi, ke bone iras la kunlaboro inter Ĉinio kaj Francio. Ĝis aŭgusto de 1983 oni jam boris 14 putojn, el kiuj ok komencis doni industrian oleon. Ĉiu el la du plej altproduktaj donas pli ol mil tunojn da nafto tage. La ĉinaj kaj francaj specialistoj analizis la abundajn geologiajn materialojn kaj faras ekonomian takson pri la plua ekspluatado. S-ro P. Picard esprimis sian kontenton pri la ĉinaj kunlaborantoj pro tio, ke ili havas bonan sperton kaj bone scias kapti freŝajn aferojn.

Mi informiĝis de respondeculo de la bazo, ke en 1984 oni komencos ĝeneralan petrolan prospektoradon en la okcidenta parto de la Suda Ĉina Maro kaj ok eksterlandaj petrolaj kompanioj, kiel la Brita Petrol-kompanio, Esso de Usono kaj Idemitsu de Japanio, kunlaboros en naŭ kontraktaj regionoj kovrantaj pli ol 30 000 kvadratajn kilometrojn de tiu maro.

VIZITO AL LA PETROLA BAZO

Kun granda intereso mi vizitis grandan modernan komputeran centron de la bazo, kun areo de 600 kvadrataj metroj. Tie kelkaj importitaj komputeroj estis en laborado. La ĉefkomputero faras milionon da operacioj ĉiusekunde. Oni uzas ĝin por trakti ne nur sismologiajn donitaĵojn, sed ankaŭ aliajn scienc-esplorajn temojn, kiel projektado de putoboraj platformoj. Post sia ekfunkciado en la fino de 1981 ĝi jam traktis sismologiajn materialojn de pli ol 50 000 kilometroj.

Elirinte el la komputera centro, mi direktis min laŭ pura asfaltita strato al loĝkvartalo de eksterlandaj specialistoj, loko pitoreska kaj kovrita per herboj. Sur la herbaro staras sep-etaĝa domo kun pli ol 100 unu-litaj ĉambroj. En ĝia teretaĝo servas restoracio kaj drinkejo. Inter la proksimaj vilaoj elrigardas pli ol 30 malgrandaj hispan-stilaj etaĝdomoj, antaŭ kiuj estas florbedoj kaj gazonoj. Mi vidis eksterlandajn knabojn bicikle ludantaj sur herboj. Ĝuste tie loĝas s-ro P. Picard, lia edzino kaj iliaj du infanoj.

Nemalproksime estas naĝejo, klubo, elementa lernejo, infanĝardeno, kuraca servo, tenisejo, korbopilka ludejo kaj superbazaro.

Mi vizitis ankaŭ specialan dokon, kie povas ankriĝi dekmil-tonela ŝipo. En ĝia ankrejo pli ol 300 metrojn longa kuŝas provizŝipoj, petrolŝipoj, fizik-esploraj ŝipoj k.a. La doko havas tri staplojn, kie bonorde kuŝas transŝarĝotaj putoboraj instrumentoj kaj aparatoj de diversaj specoj, kaj krome en ĝi staras ankaŭ pli ol dek regulaj tenejoj. Apude funkcias helikoptera haltejo. Per helikoptero oni povas flugi inter la bazo kaj la putoboraj platformoj en Bejbu. La komunika kompanio de la bazo, kun avangardaj instalaĵoj, povas kiam ajn interkomunikiĝi kun putoboraj kaj transportaj ŝipoj sur la maro.

En la laborista loĝkvartalo mi vizitis la 27-jaran boriston Ŭang Luming, ĵus revenintan de la platformo Nanhaj n-ro 2. Lia loĝejo, kiel tiu de aliaj laboristoj, konsistas el unu vestiblo kaj du ĉambroj kun fridujo, kolora televidilo, magneto-

fono k.a. Lia edzino jam iris al laboro. Li diris al mi, ke la nomita platformo, importita el Norvegio, estas avangarda kun helikoptera haltejo sur si. La haltejo povas esti uzata por transporti urĝe bezonatajn materialojn kaj transporti laboristojn de kaj al iliaj hejmoj. La boristo povas enĉambre manipuli la bremson, ŝanĝi la rapidecon de borado kaj gvidi la tutan laboron. Oni ekipis la platformon per komforta manĝejo kaj subakva televidilo por servigi ilin al laboristoj. La Brita Petrolkompanio luprenis la platformon, sur kiu Ŭang Luming kunlaboras kun eksterlandaj laboristoj de mateno ĝis vespero. Li ofte interŝanĝas kun ili opiniojn pri manipulado kaj lernas de ili, tiel ke li rapide progresas en sia teknika nivelo.

Kun grandiĝo de la kunlabora sfero oni starigas pli kaj pli da domoj. Survoje mi vidis, ke oni konstruas loĝejojn, tenejojn, vendejojn kaj hospitalon. Baldaŭ finkonstruiĝos kinejo kaj komunika ofidomo. Antaŭ ni prezentiĝas la bela perspektivo de la prospera petrola bazo ĉe la Suda Ĉina Maro.

Produktiva petrol- kaj gas-puto en Bejbu-golfo en la Suda Ĉina Maro



ĈINA SATELITO SUKCESE ENIRIS EN LA SINKRONAN ORBITON

La 8-an de aprilo 1984 Ĉinio lanĉis eksperimentan komunikan sateliton. En la 16-a de aprilo, la satelito eniris en la sinkronan orbiton de la tero kaj lokiĝis en la aero super la ekvatoro je la orienta longitudo 125°. Bone funkcias ĉiuj ĝiaj aparatoj kaj normale laboras ankaŭ la eksperimento pri komunikado, kaj radiodis-aŭdiga kaj televida transsendo. Per tio Ĉinio fariĝis unu el la malmultaj landoj povantaj fari kaj lanĉi sinkronan komunikan sateliton.

59 EKONOMIAJ LEĜOJ KAJ REGULOJ PUBLIKIGOTAJ EN ĈINIO

En 1984 ĉinaj leĝodonaj organoj ekzamenos kaj publikigos 59 gravajn ekonomiajn leĝojn kaj regularojn.

La ekonomiaj leĝoj inkludas tiujn pri forstokulturo, stepoj, asekuro, tero, mineralaj riĉfontoj, dogano, eksteraj ekonomiaj kontraktoj kaj regularo pri fondaĵoj komune entreprenataj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Sep el la ekonomiaj regularoj temas pri kontraktoj de fervoja, ŝosea, akvovoja kaj aviadila vartransportoj kaj ilia sekureco. Aliaj rilatas al ekonomiaj kontraktoj, kredito, kampara asekuro kaj la respondeca sistemo de entreprenoj posedataj de kamparaj komunumoj aŭ brigadoj.

ETILENA FABRIKO EKKONSTRUATA EN SANDONG

La 1-an de aprilo ĉijare Ĉinio komencis konstrui alian etilenan

fabrikon Ĉjilu, grandan modernan petrolkemian bazon en Ŝandong-provinco.

La unuaperioda konstrua plano plenumiĝos en 1986. Post sia kompletiĝo en 1988 la fabriko ĉiujare produktos 500 000 tunojn da plasto, 80 000 tunojn da sinteza kaŭĉuko, 200 000 tunojn da kaŭstika sodo kaj 390 000 tunojn da diversaj organikaj kemiindustriaj krudmaterialoj.

SEP TAJDELEKTREJOJ KONSTRUITAJ EN ĈINIO


Je la fino de 1983 Ĉinio finkonstruis sep tajdelektrejojn en la provincoj Ĝeĝjang, Ĝjansu kaj Ŝandong, kun totala generatora kapacito de 3 000 kilovattoj. Alia

tia elektrejo en Ĝeĝjang, la plej granda en Ĉinio, havos ses generatorojn kun totala kapacito de 3 000 kilovattoj. Du el ĉi tiuj, kun generatora kapacito de 1 200 kilovattoj, jam ekfunkciis en la lasta januaro. Kaj la ceterajn oni finmuntos eble venontjare.

Oni konstruas ankaŭ aliajn kvin mez- kaj malgrandajn tajdelektrejojn kun generatora kapacito de 4 000 kilovattoj. La konstruado dependas ĉefe de loka forto.

FOTOKONDUKTAJ FIBROJ EKUZITAJ EN URBA TELEFONIO

La internacie avangarda komunika tekniko de fotokonduktaj fibroj ekuziĝis en la urba telefonio de Pekino, Ŝanhajo, Uhan, Tjanĝin,



Eksperimenta komunika satelito je lanĉo

Nankino kaj Gujlin. La komunka kapablo de fotokonduktaj fibroj kreskis preskaŭ centoble pli multe ol tiu de ordinaraj telekomunikaj kabloj. La novaj komunikaj linioj funkcias pli bone, ebligas interparoli je tre longa distanco kaj povas ŝpari pli da neferaj metaloj necesaj por la ordinaraj telekomunikaj kabloj. Kaj krome, ili estas imunaj kontraŭ elektromagneta interfero kaj ne perfidas sekreton de telefonaj uzantoj en interparoloj.

DU MILIONOJ DA BLINDULOJ RICEVIS OKUPON

Ĉinio havas preskaŭ du milionojn da blinduloj, kiuj jam ricevis laboron kaj fundamente havas vivrimedon. En iuj urboj pli ol 90% de la laborpovaj blinduloj jam havas profesion.

La ĉina registaro ĉiam donas grandan atenton al la bonstatigo de blinduloj kaj surd-mutuloj. Ĝi alprenis diversajn rimedojn por havigi al ili laboron kaj aranĝi ilian vivon. En Ĉinio la ŝtataj departementoj de civilaj aferoj funkciigis por ili pli ol 1 600 fabrikojn kaj la loĝkvartalaj komitatoj pli ol 8 000 entreprenojn. La registaro funkciigas 54 fakajn lernejojn por blinduloj en diversaj lokoj kaj eldonas la grandan sintezan brajlan periodaĵon "Monata Gazeto por Blinduloj", kun eldonkvanto de pli ol 3 000 ekzempleroj.

KONSULTA AKTIVADO EN PEKINO POR INFANA EDUKO KAJ SANPROTEKTO

La 8-an de marto la Departamento de Infanaj Aferoj sub la Ĉina Virina Federacio kaj la Centro por Disvolvi la Aferon de Ĉinaj Infanoj aranĝis en la Pekina Geknaba Centro unuan konsultan aktivadon por eduko kaj sanprotekto de antaŭlernaj infanoj. En la aktivado profesoroj, kuracistoj kaj aliaj specialistoj volonte

plenumis la konsultadon faritan de infanoj kaj iliaj gepatroj, kaj iuj kuracistoj eĉ faris diagnozon al malsanaj infanoj.

TRI INSTITUTOJ PRI PEREONTAJ BESTOJ FONDITAJ EN ĈINIO

Ĉinio starigis po unu instituton en Harbin, Ŝji'an kaj Kantono por serĉi rimedojn protekti kaj savi pereontajn bestojn.

Inter tiuj bestoj troviĝas grandaj pandoj, tigroj de nordorienta Ĉinio. Hajnan-cervoj, blanknaĝilaj delfenoj, ruĝvertaj gruoj kaj ibisoj, kiuj vivas en suda, nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio. La institutoj studos iliajn dislokiĝon, vivan kutimon kaj leĝon en bredado kaj generado.

MILJARA PERKUTINSTRUMENTO LUDITA SUR ĈINA SCENEJO

Miljara muzika instrumento konsistanta el serio de 20 pendigitaj feraj tabuloj estis refarita kaj ludita en Ŝji'an, la ĉefurbo de Ŝenŝji-provinco.

En koncerto en la tria tagdeko de februaro oni ludis per la muzi-

kilo la melodion de Tang-dinastio (618—907) "Danco en Printempa Vento", la dancmuzikaĵon de Beethoveno "Odo 'Al la Amikoj'" kaj la japanan kanton "Sakuro".

La feraj tabuloj nomataj *fangŝjang* ("kvadrataj sonantoj"), perkutataj per latuna marteletto, estas esprimivaj, melodiaj kaj kompareblaj kun bronzaĵoj kaj ŝtonaj frapinstrumentoj.


Laŭ historiaj notoj, *fangŝjang* antaŭe konsistis el 16 feraj tabuloj. Ĝi naskiĝis en la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj en la sesa jarcento, furoris en Tang-dinastio kaj fariĝis unu el ĝiaj ĉefaj kortegaj muzikiloj. Ĝi ofte montriĝis en Tang-dinastiaj murpentraĵoj kaj perdiĝis poste.

DU ĈAMPIONECOJ GAJNITAJ DE ĈINAJ SPORTISTINOJ EN LA TUT-ANGLIA MALFERMA VOLANA ĈAMPIONADO

Post kvin-taga intensa konkurso la Tut-Anglia Malferma Volana Ĉampionado de 1984 finiĝis la 25-an de marto, en Londono. En la kvin disciplinoj ĉinaj sportistoj gajnis la ĉampionecojn de virina solludo kaj virina parludo kaj unu duan lokon kaj kvar paralelajn triajn lokojn.

Lazura porcelanaĵo, unu el la famaj porcelanaĵoj de Song-dinastio antaŭ 600 jaroj, estis reproduktita antaŭ nelonge de la Fabriko de Belartaj Ĵu-porcelanaĵoj de Linĵu-gubernio, Henan-provinco. La foto montras kalabasoforman vazon (la maldekstra) kaj lotusfoliajn vazojn.

ANTIKAJ PORCELANAĴOJ



ĈINAJ KNABOJ PREMIITAJ EN KONKURSO DE LA MONDA KOMUNIKA JARO

En la konkurso de fotoj kaj pentraĵoj titolita "Gejunuloj de la Elektronika Epoko" en la Monda Komunika Jaro okazinta en Ĝenevo, la 14-jara Ŝanhaja mezlernejo Hong Ĝjan gajnis la unuan lokon en la grupo de 13-15 jaruloj, per sia pentraĵo "Komunikado en Nia Vivo". Konkursis pli ol 700 verkoj de 37 landoj. Inter la 35 premiitaj verkoj troviĝis dek el Ĉinio. La premiado okazis la 16-an de marto en Pekino.

PENTRAĴOJ DE ĈINA KAMPARANO EKSPONATAJ EKSTERLANDE

La lastan februaron en Kanado okazis ekspozicio de pentraĵoj de Ŭang Ĝinglong de Huŝjan, gubernio de kamparanaj pentraĵoj, Senŝji-provinco. Oni montris liajn 24 verkojn. Tio estis la unua ekspozicio de pentraĵoj de ĉina kamparano en alia lando.

Ŭang aĝas 52 jarojn. Post laborado li faris vivoverajn pentraĵojn kun kruda kaj troiga stilo. En la lastaj kvin jaroj Usono, Kanado, Italio, Aŭstralio, Svedio kaj FR Germanio konservis liajn pli ol 130 pentraĵojn.

"KONCIZA BRITA ENCIKLOPEDIO" ELDONOTA DE ĈINIO KAJ USONO


La Enciklopedia Eldonejo de Ĉinio kaj la Brita Enciklopedia Kompanio de Usono kontraktis en 1980 kvin-jaran kunlaboron por eldoni "Koncizan Britan Enciklopedion". La 24 000 000-ideograma enciklopedio en dek volumoj estos konciza ĉinlingva eldono de "Brita Enciklopedio". Ĝiaj artikoloj pri Ĉinio estis verkitaj de ĉinaj-fakuloj.

LA MEKSIKIA POPOLDANCA TRUPO TURNEIS EN ĈINIO

La nomita trupo turneis marte en Pekino, Hefej, Nankino kaj Ŝanhajo. Ĝi asimilis kulturon de la antikvaj indianoj kaj la Iberan Kulturon de Eŭropo. Kun varma

sento kaj per gajaj dancopaŝoj kaj infekta melodio, la artistoj prezentis ĝenrojn de Meksikio kaj montris la humuran, malkaŝeman kaj senĝenan karakteron de sia nacio. Rigardantoj laŭdis, ke ilia prezentado impresas kiel dolĉa kaj rava nektaro.

La Meksikia Popoldanca Trupo prezentas dancon de Jalisco en Pekino.




ORKESTRO DE JAPANAJ LERNANTOJ EN ĈINIO

La Orkestro de la Tria Supera Mezlernejo de la Universitato de Japanio prezentis japanajn popolkantojn kaj modernajn kantojn

kun forta nacia koloro marte kaj aprile en Ĉinio. La 52 ludantoj estis 13-19-jaraj lernantoj. Ilia serioza kaj delikata prezentado ricevis varman aplaŭdadon de la ĉinaj junuloj.

Orkestro de japanaj lernantoj post sia prezentado en Ĉinio





Parto de Vankuvero

HAI LONG:

Vankuvero—Gemo ĉe Pacifiko

JULIE de la kuranta jaro okazos la 69-a Universala Kongreso de Esperanto en Vankuvero, la tria granda urbo de Kanado. Kiel gemo ĉe Pacifiko, ĝi ravis per sia beleco ĉiun kongresanton.

Vankuvero estas plej grava okcidenta havenurbo de Kanado

kaj portas la nomon Pordo de Kanado al Pacifiko. Kiel la centro de la moderna komerco, kulturo kaj edukado de la provinco Brita Kolumbio, ĝi ne estas tiel granda por ke la naturaj belecoj estu maskitaj de la industriaj kaj komercaj entreprenoj de la urbejo. Ĝi frontas al la golfeto Burard kaj dorse kroĉiĝas al la

Marbordaj Montoj kaj havas klimaton mildan kaj humidan.

La Universitato de Brita Kolumbio, kie okazos la kunvenoj de la kongreso, situas ĉe la kabo Grey de pitoreska montaro ĉe la okcidenta limo de la urbo. Ĝi estas la plej bela en la universitata mondo. La universitato ha-

De la 21-a ĝis la 28-a de julio la 69-a Universala Kongreso de Esp. okazos en Vankuvero, Kanado.

La kongresa temo estas “Lingvaj minoritatoj — ĉu nur nacia fenomeno?”

Dum la kongreso la Internacia Kongresa Universitato aranĝos prelegojn pri scienco kaj kulturo. La Akademio de Esperanto havos Ĉe-seminaron, kiu kaj estas destinita por spertaj esperantistoj, kaj celas la instruadon de Esp. al komencantoj.

Al la tradiciaj branĉoj de belartaj konkursoj, kiel poezio, prozo, teatraĵo, eseo, infanlibro de la jaro, fotografio, kiuj jam daŭras

33 jarojn en UK, oni aldonos ankaŭ “kanto”.

La 21-a Internacia Infana Kongreseto samtempe okazos en Vankuvero. La 40-a Internacia Junulara Kongreso okazos de la 13-a ĝis la 20-a de julio 1984, en Swanwick, Britio.

Laŭ statistiko ĝis la mezo de marto, aliĝis 531 kongresanoj el 48 landoj. En la unua loko estas Usono, la postajn lokojn okupas Kanado, Francio, Britio, Nederlando kaj FR Germanio.

La Ĉina Esperanto-Ligo sendos al la 69-a UK sian delegacion, kiu ĉeestos ankaŭ la 3-an Pacifikan Kongreson de Esperanto (14-19 julio 1984, Portlando, Oregon, Usono).

vas ĉ. 24 000 studentojn kaj ĝia tereno havas areon de 400 hektaroj. Tie troviĝas la mondfama esplorinstituto TRIUMF. Ĝi estis oficiale malfermita de ĉefministro Trudeau en 1975.


Sur la universitata tereno estas la fama Antropologia Muzeo, scienc-esplora kaj instrua centro pri antropologio. En ĝi konserviĝas pli ol 200 artverkoj, parto el diversaj landoj kaj pliparto el la indianoj ĉe la marbordo de la nordokcidenta parto de la norda Ameriko.


La parko Stanley situas sur promontaro apud la komerca centro de la urbo kaj kovras pli ol 400 hektarojn. En 1887, kiam ĝi apartenis al la komunumo de Vankuvero, ĝi estis tute kovrita de indiĝena arbaro kaj hodiaŭ granda parto ankoraŭ restas en natura stato. Se oni posedas energion, oni povas ĉirkaŭiri la parkon laŭ piedvojo, kiu sekvas la marbordon kaj estas dek kilometrojn longa. Kiam vi atingos la okcidentan flankon de la promontaro, vi preterpasos la rimar-

kindan Sivaŝ-rokon, kiu aspektas kiel granda homfiguro. Laŭ indiana legendo ĝi estas la ŝtonigita formo de heroo indiana klanestro, kiu defiis la postulojn de gigantaj sorĉistoj. Ne malproksime, ĉe plaĝo estas simpla mo-

numento memore al la amata indiana kantistino kaj verkistino Paŭline Johnson, kiu kolektis kaj skribis la legendojn de la lokaj indianoj, inkluzive de tiu pri Sivaŝ-roko. Alia legendo kolektita de ŝi rilatas al la du montpintoj,

En la Universitato de Brita Kolumbio, la kongresejo de la 69-a UK





Kvieta valo

kiuj elstaras en la montoj norde de Vankuvero kaj estas konataj de indianoj sub la nomo Du Fratinoj. La legendo diras, ke potenca indiana klanestro, post sia sukcesa sed sangoverŝa milito kontraŭ aliaj marbordaj klanoj, volis festi la adoleskantecon de siaj filinoj. La du knabinoj petegis sian patron unue fari pacon kaj inviti la malamikojn al granda festeno kaj la indulga patro

konsentis tion. Por memori la pacamantajn fratinojn la indianoj donis la nomon al la du montpintoj.

Alia vizitinda loko estas Parko de Reĝino-Elizabeta, kiu situas sur monteto en la mezo de la urbo. De tie videblas la impona Kapilano-kanjono kaj la majestaj du montpintoj. Ĉe la supro de la parko, sub vitra kupolo, videblas tropikaj plantoj kaj birdoj libere flugantaj.

Estas agrable por vi veturi per kablotramo al la supro de la monto Grouse. De la pinto je



La neĝmonto Robson

1 250 metroj super la marnivelo oni admiras superban panoramon de Vankuvero kaj la ĉirkaŭaĵon. Se la aero estas klara, oni povas vidi la Vankuveran Insulon kaj la insulojn de la Georgia Golfo, kelkfoje eĉ la neĝotegitan pinton de la monto Baker en la usona Vaŝingtonio. Se vi havas intereson spekti tie la nokton, vi povas vidi la fabelan noktan spektaklon de la lumigita urbo.

La ĉarma urbo Vankuvero kun okuloj mildaj kaj fervoraj atendas alvenon de esperantistoj.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			26.2	11445
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	19.2	15600
			26.0	11515
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	19.8	15100
			30.3	9880
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	19.7	15165
			25.6	11685

ARBEGO KAJ ARBETO

SUR vastega stepo alte staras arbego kun dika trunko kaj densa foliaro. Apud la arbego kreskas arbeto.

Karesado de sunradioj, nutrado de pluveroj. Rapide kreskis la arbeto. Post mallonga somero la arbeto jam altiĝis pli ol unu metron.

Iun tagon, la arbeto, kun levita kapo, demandis la arbegon: "Kiom da jaroj vi havas?"

La arbego respondis kun milda rideto: "Mi jam havas cent jarojn."

La arbeto miris: "Kio? Jam cent jarojn? Kial do vi kreskas tiel malrapide? Mi, kvankam trimonata, estas sufiĉe alta. Certe mi superos vin post nelonga tempo."

Kun fiera mieno la arbeto ne volis babilu plu kun la arbego. La arbego mallaŭte vespiris,

skuis la kapon kaj diris nenion.

Subite ŝtormo atakis la stepon. La vento estis tiel furioza, kaj la pluvo estis tiel torenta, ke la arbeto povis malfacile stari. Se la arbego ne ŝirmus la arbeton de la vento, ĝi certe rompiĝus en la ŝtormo.

Post la ŝtormo denove sereniĝis la ĉielo. Elprovidite de la ŝtormo, la arbego montriĝis pli fortika kaj pli majesta, dum la arbeto klinis la kapon pro honto.

VULPO KAJ SIMIO

Sur rivero kuŝas insuleto, kie kreskas persikarbo kun klinitaj branĉoj plenaj de ruĝaj fruktoj.

Vulpo kaj simio vagis al la riverbordo kaj vidis fruktojn sur la arbo. Sed, neniu el ili scipovis naĝi. Kion fari? La vulpo kaj la simio longe cerbumis, kaj fine la saĝa vulpo proponis konstrui simplan ponton.

La vulpo kaj la simio faris grandan klopodon kaj altrenis al la rivero velkintan arbon. Ili metis transverse la trunkon super la riveron kiel ponton. La ponto estis tro mallarĝa, kaj la vulpo



kaj la simio devis trapasi ĝin nur unu post la alia.

La vulpo do diris al la simio: "Mi transiru la unua, kaj vi sekvu min." La simio konsentis tion senpripense.

La vulpo surpaŝis la ponteton. Ĝi paŝis kaj paŝis, kaj subite venis al ĝi en la kapon malbona ideo: "Se mi sola manĝus la fruktojn!" Kiam la vulpo atingis la kontraŭan bordon, ĝi tuj piedpuŝis la trunkon en la riveron.

"Ha, ha, ha! stulta simio, nun iru hejmen kaj revenu post kiam mi ĝissate ĝuos la persikojn."

La simio forte koleriĝis, sed baldaŭ ekridis: "Ha, saĝa vulpo, ne ĝoju tro frue. Antaŭ ol manĝi la persikojn, pripensu kiel trapasi la riveron." Tion dirinte, la simio foriris grandpaŝe.

Nur tiam la vulpo eklumiĝis kaj maltrankviliĝis treege. Ĝi devis tuj turni sin al la simio kun petego:

"Revenu, mia kara amiko, helpu min transiri la riveron!"

La simio daŭrigis sian vojon senhezite, eĉ ne returnante la kapon.



DUA ESPERANTO-KURSO EN RADIO ĈONGĈING

Laŭ la peto de multaj Esp-aman-
toj malfermiĝis la 5-an de marto
la dua disaŭdigata Esperanto-kurso
post la unua, kiu daŭris de julio
de la pasinta jaro ĝis februaro de
la kuranta jaro. La kurso kun
6 000 lernantoj estas funkciigata
de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio
kaj la Ĉongĉing-a Popola Radio.
La asocio starigis tri lernohelpajn
punktojn en urbaj kvartaloj por
peti opinion de lernantoj kaj fari
postlecian helpon al ili. La kur-
so daŭros unu jaron.

ESPERANTO EN ĈINAJ ALTLERNEJOJ

Post kiam 17 altlernejoj ekprenis
Esperanton kiel nedevigan lernob-
jekton, la instruado de Esperanto
en altlernejoj akiris pluan progre-
son. La 13-an de januaro la Eduka
Buroo de la Gŭangŝji-a Ĝuang-
nacieca Aŭtonoma Regiono sciigis
ĉiujn altlernejojn en la regiono pri
instruado de Esperanto kiel nede-
viga lernobjekto, postulante, ke
“tiuj altlernejoj, kiuj havas eblon,
instruu Esperanton kiel devigan aŭ
nedevigan lernobjekton”. Nun
parto de la altlernejoj jam komen-
cis preparan laboron.

La Sudokcidenta Instruista Ins-
tituto, sub la helpo de la Ĉongĉing-
a Esperanto-Asocio, organizis Es-
peranto-kurson, en kiu lernas 37
instruistoj. La kurso komenciĝis
en la 15-a de marto. La instituto
estas unu el la grandaj altlernejoj
en sudokcidenta Ĉinio. La kurso
forte influos la regionon.

En la kuranta semestro la Hefe-
a Fremdlingva Kolegio funkciigas
du perfektigajn kursojn, en kiuj
lernas pli ol 80 esperantistoj el 19
provincoj kaj municipoj. La kursoj
daŭros unu jaron.

Ankaŭ la Ĝjangŝji-a Instruista
Universitato kaj la Ĉangĉun-a
Poŝta kaj Telekomunika Instituto
organizis porinstruistajn Esp-kur-
sojn, en kiuj lernas ĉirkaŭ 60
instruistoj. La kursojn gvidas la
instruistoj, kiuj finis sian studon
en la dua porinstruista Esperanto-
kurso funkciigata de la Ĉina Es-
peranto-Ligo.

Por akceli la studon pri loĝan-
taraj problemoj en internacia sfero,
la Loĝantaresplora Instituto de la
Ĝjilin-a Universitato kaj la Scienca
kaj Teknika Asocio de Ĉangĉun
fondis postlaboran Esperanto-kur-
son je la unua de marto.

S-RO YOSHIMI UMEDA EN PEKINO

De la 12-a ĝis la 18-a de marto
vizitis Pekinon s-ro Yoshimi Ume-
da, vicprezidanto de UEA kaj
direktoro de JEI. Dum sia restado
en Pekino li renkontiĝis kun sami-
deanoj de la Ĉina Esperanto-Ligo,
la Pekina Esperanto-Asocio, la re-
dakcio de “El Popola Ĉinio”, la
Esperanto-sekcio de Radio Pekino
kaj la Esperanto-sekcio de la

Internacia Libro-komerca Kom-
panio de Ĉinio (Guoji Shudian)
kaj interŝanĝis kun ili opiniojn pri
eldonado, distribuo kaj radiosai-
digo kadre de nia lingvo. S-ro
Umeda ankaŭ vizitis la trian
porinstruistan kurson kaj prelegis
al pekinaj esperantistoj pri la Es-
peranto-movado en Japanio, Azio
kaj aliaj regionoj.

FRUKTIS KORESPONDA ESP- KURSO DE HŬANGŜI

La unuan de januaro de la pa-
sinta jaro la Hŭangŝi-a Koresponda
Esperanto-kurso varbis pli ol
15 000 lernantojn, kiuj loĝas en 29
provincoj, municipoj kaj aŭtono-
maj regionoj kaj apartenas al dek
kvin naciecoj kiel la han-a, huj-a,
mongola, tibeta, korea, ujgura, ka-
zaĥa kaj hani-a. Dank' al la kons-
cienca laboro de la kursgvidantoj
kaj sia diligenta lernado la kur-
sanoj akiris bonajn notojn. Laŭ
nekompleta statistiko pri ilia lasta
ekzameno, iliaj notoj meznombro
estis 83.1 poentoj. Nun oni jam
akceptis lernantojn por la dua
kurso.

S-ro Umeda kaj lernantoj de la tria porinstruista Esp-kurso en Pekino



INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ FONDITA

Post tri-jaraj klopodoj fondiĝis Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE) okaze de la 4-a renkontiĝo de slavoniaj esperantistoj pasint-aŭtune, kaj ekde 1984 aperas gazeto VOĈO de HANDIKAPULOJ 6-foje jare. Ĉiuj esperantistoj kaj neesperantistoj estas invitataj helpi la novan asocion, aliĝi al ĝi kaj aboni la novan gazeton. Bonvolu direkti vin al VOĈO DE HANDIKAPULOJ, 56227-Borovo, Ŝkolska ul, 25, Jugoslavio.

JAM KOMPLETIGITA PLENA VERKARO DE ZAMENHOF

Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj, kiuj estas aĉeteblaj kiel kompleto por 7 800 belgaj frankoj. La unua volumo (unuaj libroj por esperantistoj) ne plu aĉetebla ekster la kompleto. Aliaj 9 haveblas unuope (po 780 belgaj frankoj). Aperis ankaŭ du "Kromkajeroj" (po 660 belgaj frankoj). Ĉio estas aĉetebla ĉe Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijio-Antwerpen, Belgio. La sendokostoj ne estas inkluzivitaj.

LA 44-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 7-a ĝis la 12-a de julio 1984 okazos en Seviljo la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto. Se vi volas veni al ĉiamprintempa suda hispana urbo, mendu informojn kaj aliĝilojn rekte al la loka kongresa komitato, str. Sol, 75, Sevilla-a, Hispanio.

LA DUA INTERNACIA TURISMA SEMAJNO EN MALTO

Post la sukcesa Unua Turisma Semajno okazinta en 1981, Esperanto-Societo (Malta) okazigos



La Hukuoka Esperanto-Societo de Japanio en Zamenhofa Festo. Intertempe junaj grupanoj prezentis bildteatron el la rakonto "Konstrui Novan Ponton" eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

la duan internacian turisman semajnon de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1984.

Por detalaj informoj, programoj kaj aliĝiloj, skribu tuj al: Esperanto-Societo (Malta), P.O. Box 142, Valletta, Malta.

Limdato por aliĝi: la 15-a de junio 1984.

6-A JARA KONGRESO DE PAKISTANA ESPERANTO-ASOCIO

La 6-a jara kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio okazis de la 22-a ĝis la 24-a de la pasinta decembro en la urbo Multan. Ĝin ĉeestis pli ol 100 esperantistoj kaj aliaj personoj el diversaj urboj. Prezidanto de tiu kongreso kaj fondinto de la asocio s-ro Muztar Abbasi faris prelegon. Li diris, ke por distvastigi Esperanton en Pakistano monata revuo devas esti eldonata kaj ili klopodos starigi Centron de Esperanto-Eldonado. Prezidanto de la asocio s-ro G.N. Pervaz diris, ke li nuntempe verkas pli grandan Esperanto-Urdulingvan Vortaron. Aliaj prelegantoj diris, ke Esperanto estas tre

bezonata por paco, amikeco kaj frateco inter la homoj dum nuna tempo de malpaco kaj nur Esperanto meritas esti internacia lingvo.

S-ro Muztar Abbasi prelegas en la kongreso.



Ŝi kaj estonta medicino

EN la esplora sfero de mikrocirkulado brilas aŭroro de espero kaj misteraj koloroj.

Okazis signifoplena afero:

La nova breĉo en esplorado de mikrocirkulado estis farita de mezaĝa medicina specialistino de la Ĉina Popola Respubliko. Ŝi estas 47-jara Ŝiŭ Ĵujĝjŭan, kiu laboras en la Instituto de Bazaj Medicinaj Sciencoj sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj. La usonaj kaj eŭropaj aŭtoritatoj pri mikrocirkulado respektive nomas ŝin d-rino Ŝiŭ Ĵujĝjŭan.

ŜI GAJNIS ESTIMON

En printempo de 1981 Ŝiŭ Ĵujĝjŭan venis al Usono kaj estis sendita al la mikrocirkulada esploro, gvidata de profesoro Patrick D. Harris, en la Universitato de Missouri.

Ĉe la unua renkontiĝo Harris fiksis sian akran rigardon sur Ŝiŭ kaj simple diris: "Faru eksperimenton kun Tennessee."

Post la unuata eksperimentado Tennessee, esplorstudento kun barbo, raportis al Harris: "Doktorino Ŝiŭ lerte faris ĉion."

Tio iom mirigis Harris, sed li diris nenion.

Iuvespere Harris kaŝe iris en la kvietan laboratorion kaj projekciis ĉiujn videbendojn, kiuj registris la eksperimentajn rezultojn fare de Ŝiŭ, kaj persone kontrolis ĉiujn donitaĵojn pri mikro-angio en eksperimentado de kremastera muskolo. Li surpriziĝis de tio, ke Ŝiŭ estas neordinara mikrocirkula specialistino.

Harris ja estas aglokula sciencisto.

En sia studa periodo en la Dua Medicina Instituto de Moskvo la pli-ol-20-jara Ŝiŭ jam montris sian neordinaran talenton en faro de specimeno de batanta helika koro.

En printempo de 1965 akuta meningito atakis la urbon Pekino, apenaŭ 30-jara klinika esploro

risto Ŝiŭ havis ŝancon praktike esplori mikrocirkuladon. Ŝi kolektis grandan nombron da donitaĵoj pri mikrocirkulado en klinika esplorado. Tio estas praktikaj spertoj mankantaj al alilandaj mikrocirkulaj specialistoj.

En 1971 Ŝiŭ Ĵujĝjŭan atente observis, en la Popola Hospitalo de Siĉŭan-provinco, mikrocirkuladon de fingro-unga faldo de multaj mortantaj suferantoj de kor-pulma malsano. Post duonjara esplorado ŝi elmetis kuraĝan supozon: ŝoko aŭ morto de la suferantoj de kor-pulma malsano estas kaŭzita eble ne de kor-perturbo, sed de perturbo de mikrocirkulado.

.....

De tiam, dank' al sia talento kaj diligenteco tiu medicinistino el Pekino gajnis estimon de Harris.

En iu bankedo Harris volis mildigi la rilaton kun tiu ĉina specialistino, li ridete demandis: "Ĝjŭan, mi volus scii kial vi ne nomas min Pat?"


MAGIA EFIKO DE ĈINA DROGO

La malsanoj, kiaj miokardia infarkto, cerba trombozo. . . , minacas la homvivon ne malpli ol kancera proliferado.

Medicinistoj en la mondo klopodis por trovi fidindan kaj stabilan drogon por inhibicii trombozon sen malutilo.

En la someraj ferioj de 1981 d-rino Ŝiŭ venis al la Hematologia Sekcio de la Universitato de Minnesota Hospitalo en Minneapolis. D-roj Hammerschmite kaj Jacob kun dubo kaj espero akceptis tiun ĉi nigraĥaran orientan virinon. Ŝi kunportis novan drogon "654" kaj kuraĝan supozon: "654" eble povas inhibicii koaguliĝon de trombocitoj kaj granulocitoj, kaŭzantan trombozon.

La drogo "654" estis ekstraktita de la Medikamenta Instituto de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj kaj aliaj unuoj, el iu vegetaĵo kres-



Ŝiŭ Ĵujĝjŭan donas konsilojn al siaj helpantoj en observado de mikrocirkulado.

kanta en Tibeto. En somero de 1965, ĝi jam montris sian magian efikon de klinika praktiko en savo de suferantoj de akuta meningito. Dank' al ĝi la morto-proporcio de malsanaj infanoj reduktiĝis de 67% al 12.4%.

D-rino Ŝiŭ kaj usonaj doktoroj kune komencis eksperimentadon en la Hematologia Sekcio de la Universitato de Minnesota Hospitalo.

Ŝiŭ sinsekve trifoje elprenis sangon el sia korpo por eltiri granulocitojn kaj trombocitojn kaj ilin determinis per trombocita sumigo-metro kaj elektrona ĉelo-kalkulilo.

La hipotezo fine estis pruvita:

La drogo "654" povas inhibicii 50 procentojn de koaguliĝo de granulocitoj, kiun oni akcelis per speciala kemiaĵo.

Maldensa "654" povas inhibicii koaguliĝon de trombocitoj kaŭzitan de adenzina difosfato aŭ adrenalino.

"654" ne havas kemian venenon, kiun entenas atropino.

En marto de 1982 la fama usona medicina revuo JAMA publikigis la disertacion de Ŝiŭ Ĵujĝjŭan pri efiko de "654" en inhibiciado de formiĝo de trombozo kaj de koaguliĝo de granulocitoj kaj trombocitoj. Ricevinte la disertacion,

la Federacio de Usonaj Societoj de Eksperimenta Biologio tuj skribis al Ŝiŭ, laŭdante ke tiu ĉi estas unu el la malmultaj raportindaj disertacioj inter pli ol sep mil disertacioj ricevitaj de la federacio. La disertacio estis tuj enmetita en la dosieron de elstaraj disertaĵoj de la federacio kaj eksponita en la jarkunveno.

NOVA IMPETO

En somero de 1982 d-rino Ŝiŭ, invitive de doktoro Max Intaghetta, venis al la Kalifornia Universitato kiel subprofesoro por gvidi mikrocirkulan laboratorion. Alia kuraĝa supozo estis pruvota tie ĉi.

Frue en 1972 d-rino Ŝiŭ jam dubis pri la opinio de la internacia medicina rondo dum la pasinta longa tempo, ke la mikrocirkulado havas leĝon saman al tiu de la korpa sango-cirkulado. Ŝi trovis, ke mikrocirkulado havas sian propran leĝon. Sed kio estas ĝia efektiva leĝo?

En la monde supera laboratorio de doktoro M. Intaghetta ŝi longtempe monitoris kaj analizis moviĝon de viva mikroangio sub intravitala mikroskopo.

Aperis grava trovo: la moviĝo de mikroangio sin prezentas en onda formo. Ĝi pumpis sangon en histojn kaj organojn per marondo-simila salto kaj impeto.

Laŭ la teorio de marondosimila pumpado, serio da malsanoj eble ricevos novajn klarigojn. Ekzemple, kial aperas funkcia perturbo kaj nekrozo de pulmo, reno kaj aliaj organoj, post kiam oni aplikas eksterkorpan cirkuladon aŭ artefaritan koron. Ŝiŭ Ĵujĝjŭan opiniis, ke tio estas kaŭzita ne nur de mikrotromboziĝo, sed ankaŭ de tio, ke la regula moviĝo de organa mikrocirkulado estas malordigita de la mekanika puŝmovo.

Tiu teorio havas grandan praktikan signifon.

En aprilo de 1985 okazis en Ĉikago la 29-a Kunveno de la Usona Mikrocirkula Societo. Apenaŭ Ŝiŭ legis sian traktaĵon pri longtempa monitorado super regula mikroangia cirkulado en la kunveno, varma aplaŭdo sonis tra la tuta halo.

HONORA REVENO AL LA PATROLANDO

La esploraj rezultoj de Ŝiŭ Ĵujĝjŭan altigis la prestiĝon de la ĉinaj medicinaj rondoj en la mondo.

En la 28-a Jarkunveno de la Usona Mikrocirkula Societo d-rino Ŝiŭ estis akceptita kiel ĝia membro.

En la sekvanta jarkunveno ŝi estis invitita al la podio. Kaj en tiu ĉi kunveno ŝi estis invitita

kiel vicredaktoro de "Mikroangia Esploro: Internacia Ĵurnalo" de Novjorko.

En junio de 1983, fondiĝis la Internacia Instituto de Mikrocirkulado en Svedio. D-rino Ŝiŭ estis elektita kiel unu el ĝiaj kvin ĉefaj gvidantoj. Sur la placo de la kunveno oni hisis la naciajn flagojn de la Ĉina Popola Respubliko kaj aliaj tri landoj. Ĝia prezidanto M. Intaghietta diris en sia letero: "Ŝiaj (Ŝiŭ Ĵujĝjŭan) personeco, karaktero kaj altnivela esplora laboro faris ŝin okulfrapa persono en internaciaj sciencaj kunvenoj."


Ŝia grava trovo ankaŭ allogis eŭropajn kaj amerikajn farmaciajn firmaojn. Ili promesis al ŝi prosperan perspektivon de "milionulo", sed ŝi rifuzis. Ŝi diris: "Ĉiuj miaj trovoj apartenas ne nur al mi, sed ankaŭ al mia patrolando."

En septembro de 1983 Ŝiŭ Ĵujĝjŭan revenis al Pekino post plenumo de pli ol dudek esploraj temoj en Usono.

La registaro alte taksis ŝiajn esplor-rezultojn, promociis ŝin subesploristo kaj asignis 250 000 usonajn dolarojn por aĉeti instrumentojn kaj ekipaĵojn por ŝia laboratorio.

Ŝiŭ Ĵujĝjŭan laboros por daŭre fari siajn kontribuojn en sia patrolando.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Suda Ĉina Maro
3. Ĝanĝjang (Ĝuangdong-provinco)
4. Ŝanhajo
5. Ĝjangŝji-provinco
6. Ŝaŭŝing (Ĝeĝjang-provinco)
7. Dajŝjan-gubernio (Ŝanŝji-provinco)
8. Ning'u-gubernio (Ŝanŝji-provinco)
9. Pjangŭan-pasejo (Ŝanŝji-provinco)
10. Ĉongĉing (Siĉjŭan-provinco)
11. Hefej (Anhuj-provinco)
12. Hŭangŝji (Hubej-provinco)
13. Kunming (Junnan-provinco)
14. Ŝiĝjaĝŭang (Hebej-provinco)
15. Ŭenĉŭan-gubernio (Siĉjŭan-provinco)
16. Fengĝje (Siĉjŭan-provinco)
17. Jiĉang (Hubej-provinco)
18. Anhuj-provinco
19. Ŝandong-provinco



Ŝiŭ Ĵujĝĵuan kaj ŝia studo de mikrocirkulado

Bv. legi la artikolon "Ŝi kaj Estonta Medicino" en tiu ĉi numero.

Ŝiŭ Ĵujĝĵuan prelegas en la 28-a Kunveno de la Usona Mikrocirkula Societo.

Ŝiŭ Ĵujĝĵuan (la dua de maldekstre) en la inaŭgura kunveno de la Internacia Instituto de Mikrocirkulado en Svedio, en kiu ŝi estis elektita kiel plenuma membro kaj konstanta komitatano de la instituto. En la kunvenejo oni hisis la ĉinan flagon.






Siŭ Ĵujĝjŭan (la meza), prezidanto prof. Marcos Intaghietta (la maldekstra) de Usono kaj sveda konstanta komitatano Karl Arfors (la dekstra) en laboratorio




Siŭ Ĵujĝjŭan (la unua de maldekstre) en la prepara kunveno de la Internacia Instituto de Mikrocirkulado en Upsalo, Svedio, en februaro 1983




Ŝiŭ Fujĝjŭan prelegas en la inaŭgura kunveno de la Internacia Instituto de Mikro-cirkulado en Svedio.

Ŝiŭ Fujĝjŭan (la maldekstra) en la de ŝi direktata mikrocirkula laboratorio de la Universitato de Kalifornio en San-Diego



Ŝiŭ Fujĝjŭan en laboratorio en Usono





Ŝiŭ Ĵujĝjŭan kaj Nobel-premiito prof. Bengt Samuelsson de la Karolinska Instituto de Svedio



Intervidiĝo de Ŝiŭ Ĵujĝjŭan (la tria de maldekstre), ĉin-devena usonano Ĉjan Ŝji, specialisto kaj prezidanto de la 27-a Kunveno de la Usona Mikrocirkula Societo, lia edzino (la unua kaj la dua de maldekstre) kaj prof. B. Zweifach

Kampanoj post riĉiĝo

NI ESTAS ANKORAŬ SAMVILAĜANOJ!

Somere de 1985, en la baseno de Fuhe-rivero en Ĝjangŝji-provinco, senĉese pluvegis, la rivero ŝvelis kaj breĉis parton de la rivera digo. Multaj vilaĝoj dronis en la senlima akvo.

Ŭang Facaj de la vilaĝo Ŭangĝja estas lerta terkulturisto kaj flosisto. Dank' al praktikado de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado en la kampano dum la lastaj jaroj, lia familio diligente laboris kaj rapide riĉiĝis. Li konstruis novan etaĝdomon, aĉetis kvin kompletojn da mebloj, multajn vestojn kaj aliajn objektojn.

Lia hejmo estas centojn da paŝoj for de la rivera digo. Kompreneble, lia hejmo estos la unua suferanto, se okazos breĉiĝo de la digo. Tion li jam vidis antaŭ la breĉiĝo kaj faris floson por transporti al sekura loko siajn familianojn kaj

Ŭang Facaj konstruis novan etaĝdomon kaj aĉetis televidilon du jarojn post kiam la havaĵo de lia familio perdiĝis en superakvego.



valorajn objektojn. En la tago, kiam la digo breĉiĝis, starante sur sia domo, li vidis multajn samvilaĝanojn sur la tegmento de domoj tuj disfalonantaj en ventopluvo. Li senhezite veturigis sian floson tien kaj transportis ilin al la mezlernejo en alta loko. Kiam li revenis de la lernejo, liaj familianoj intencis forporti siajn valorajn objektojn per la flosa, li tuj haltigis ilin, dirante: "Plej gravas savi homojn!" Kaj sekve, li savis vilaĝanojn sur tegmentoj, arboj kaj telegrafaj fostoĵoj. Kiam li lastafoje revenis en la vilaĝon, li trovis kampanon Ŭang Muĝong krianta por helpo sur sia domo. Li lerte veturigis la floson al li trapasinte torenton kaj elsavis lin kaj liajn tri familianojn. Apenaŭ ili forlasis la domon, ĝi disfalis. Antaŭ ol la registaro sendis savboatojn, li savis pli ol 60 homojn. Sed la vestoj, objektoj kaj greno de lia familio estis forportitaj de la torento.

Post kiam la superakvo malleviĝis, Ŭang Facaj kaj liaj familianoj forigis brikojn sur la ruino kaj starigis budon sur la antaŭa cementa planko. Li portis vestojn donacitajn de aliaj kaj dormis en la lito pruntedonita de lia parenco, kio kortuŝis samvilaĝanojn ĝis larmoj. Tamen li diris: "Mia perdo estas ne grava, nur se samvilaĝanoj estas sekuraj. Kvankam nun praktikiĝas la respondeca sistemo kaj ĉiu familio kontraktas terpecon por kulturi, tamen ni estas ankoraŭ samvilaĝanoj!"

Ŭang Facaj (la unua de maldekstre) kaj la familio de li savita





U Ling (la dekstra), filino de U Ĝin'an, helpas elementlernejanon lerni han-lingvon.

NE PROKRISTI KLERIGADON DE INFANOJ

En la vilaĝo Da'ugang de la gubernio Hŭajbin ĉe la supra baseno de Hŭajhe-rivero estas pli ol-50-jara kamparano U Ĝin'an. Lia patro estis jardungito de bienulo iam en la malnova socio. Pro la malfacila vivo la patro konfidis lin al lia onklo. Tie U Ĝin'an lernis apenaŭ du jarojn en privata malnovtipa lernejo.

En 1980 oni praktikis la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado en lia vilaĝo, li laŭkontrakte kulturis du hektarojn da agro. Dank' al apliko de scienca metodo li akiris riĉrikolton en la sinsekvaj jaroj. Post la tritika rikolto de 1982 li enspezis pli ol 4 000 jŭan-ojn (egale al 2 000 usonaj dolaroj).

La vilaĝo Da'ugang situas ĉe la limo de la provincoj Henan kaj Anhuj, malproksime de la urbo, tial la vilaĝanoj havas malaltan klercon. Antaŭe la vilaĝo havis unu elementan lernejon ĉe bordo de la rivero, malproksime de la vilaĝo. En somero ofte okazis rivera inundo, tial la kamparanoj ne volis, ke iliaj gefiloj vizitu la lernejon. Tial en la vilaĝo multaj kamparanoj estas analfabetoj.

U Ĝin'an tre maltrankviliĝis de tio. En la pasinta somero, interkonsiliĝinte kun la tuta familio, li konstruis en la vilaĝo elementan lernejon, elspezinte 5 000 jŭan-ojn laborakiritajn dum la lastaj jaroj. Li ne postulas de la lernantoj lernopagon. Kaj krome, li mem salajras du instruistojn.

Oni proponis, ke li riparu sian domon, sed li diris: "Ne gravas prokrasti mian aferon, sed gravas ne prokrasti klerigadon de la infanoj!"

PAGI ENHOSPITALIĜAN KOSTON POST 21 JAROJ

Februare de la kuranta jaro, iu maljuna kamparanino de la antaŭurbo de Ŝanhajo venis al la kasejo de la Centra Hospitalo de Pudong kaj donis al ĝi 100 jŭan-ojn, dirante al ĝia laboranto: "Kamarado, mi pagas al vi mian kuracan koston."

La sumo estis ŝuldata de ŝi antaŭ 21 jaroj, kiam ŝi enhospitaliĝis pro malsano.

La maljunulino nomiĝas Caŭ Ŝingmej. Junie de 1963 ŝi ricevis operacion en la hospitalo. Tiam ŝia familio vivis malfacile. Pro tio la hospitalo ne postulis de ŝi la operacian koston.

En 1983 oni komencis praktiki la produktan respondecan sistemon en la vilaĝo. Ŝi scipovas brodi kaj okupiĝas pri brodado kune kun siaj filino kaj bofilino. La pokapa enspezo de ŝia familio en la jaro atingis 1 200 jŭan-ojn.

Aŭdinte la vortojn de la maljunulino, laborantoj de la hospitalo estis kortuŝitaj. Tamen ili insistis pri malakcepto de la monsumo. La maljunulino diris kun larmoj: "Dum la pasintaj 21 jaroj mi ĉiam ŝuldis mian dankon al la kuracistoj kaj ankaŭ al la ŝtato. Hodiaŭ mi venis ĉi tien kune kun miaj filo, bofilino kaj filino por esprimi mian koran dankon al la ŝtato. Nepre akceptu la monon."

Pro ŝia insistado la hospitalo povis fari nion alian ol akcepti la koston.

**A
n
o
n
c
o**

Por starigi Libroservon, nia asocio kolektas amase esperantajn eldonaĵojn, inkluzive de scienco-teknikaj, literaturaj libroj (prefere verkitaĵoj originale en E), organoj kaj lernolibroj. Al ĉiu sendinto ni rekompencos per belaj pm. k. pk. aŭ laŭeble io alia laŭ peto. Skribu al la Wuhan-a E-Asocio, P.O. kesto 230, Wuhan, Ĉinio.

Por savi dronantan knabon

LA vivo de dronanta knabo premis la koron de sennombraj homoj.

Tio okazis en la zoologia ĝardeno de Ŝiĝjaĝŭang, la ĉefurbo de Hebej-provinco. En la unuaj tagoj de marto ĉi-jare, fariĝis varmete kaj la glacitavolo de la lago Ĉenlju iom post iom maldikiĝis. Tiutage ĉie en la zoo svarmis vizitantoj.

“Helpu! helpu!” subite aŭdiĝis de la lago: Krevis de piedpremo la glacitavolo kaj falis en la akvon 11-jara elementlernejano Liŭ Ĝanhŭa. Vidinte tion, du junuloj sagrapide alkuris tien kaj kuŝiĝis sur la ventro ĉe la rando de la aperturo. Unu pasigis al la enakviĝinto sian kaptukon, kaj la alia etendis sian manon al li. Pro la peza premado la glacitavolo disrompiĝis, kaj

enakviĝis ankaŭ la du helpantoj. Tuj sekve alkuris rapidege aliaj tri junuloj por helpi ilin. “Bum!” krevis la glacitavolo kaj ankaŭ ili tri falis en la akvon.

Estis ankoraŭ malvarmo en la aero de la frua printempo. En la malvasta glacitruo, atakate de la ostotranĉa frostro, ili ne povis elakviĝi, nek naĝi foren. La glacitavolo krevis kaj krevis je ĉiu ekkapto de la rando. La frostro paligis la enakviĝintojn. Danĝero kreskis kun ĉiu sekundo. Tiu-momente ili zorgis ne pri si mem, sed pri la knabo dronanta. Ili pene trovis la knabon kaj levis lin super la akvosurfacon, kunpremante siajn dentojn.

Sur la glacio oni rapide organizis sin en savan grupon. Ili kuŝiĝis sur la ventro unu post alia sur la glacio. La plej antaŭa

pasigis arbeton al dronanto kaj ĉiu el la malantaŭaj firme tenis la piedojn tuj de la antaŭa. Ili formis longan homĉenon. Ili takte trenis la enakviĝinton. Ho ve! Pro fortega tirado la arbedo elglitis el la manoj de la plej antaŭa junulo. Rec krevis la glacitavolo kaj aliaj tri falis en la frostan akvon.

La tempo signifas vivon. Sur la glacitavolo ĉe la okcidenta bordo oni memvole formis homan ĉenon. La savantoj sur la glacitavolo kaj en la akvo ne konis unu alian, nek havis komandanton. Por savi la enfalintojn ili memvole formis unuiĝintan kolektivon.

“Ne tiel faru! Rompu la glacieron! Tuj!” La vortoj donis sugeston al la savantoj, kaj ili tuj komencis rompi la glacieron. bati

Savantoj sur la glacio



Homoj pretaj por savi dronanton





*Al insuleto naĝas tri bravuloj, el kiuj Ŭang Deheng (la meza) dro-
nis poste.*

ĝin per la piedoj, premi per la brakoj kaj forpuŝi per la brusto. Armeano Ĝang Ĝjuŝeng, falinta en la akvon, saltis sur la glaci-tavolon kaj ekruliĝis sur ĝi, intencante rompi la tavolon kaj malfermi la vojon, por ke la enfalintoj alnaĝu. Peco da glacio krevis kaj li refoje falis en la akvon. Estas pli ĝuste diri, ke li degeligis la pecon da glacio per sia sango, ol diri, ke li rompis ĝin per sia korpo!

Etendiĝis la akvovojoj, el kiuj unu kondukis al la okcidenta bordo kaj la alia al la insuleto en la lago. La enakviĝintaj savantoj alborde ĝis la du vojoj. Ŭang Deheng, kiu la unua saltis en la akvon, pene naĝis al la insuleto. Li ĵus finis la noktan deĵoron kaj ankoraŭ ne ripozis. Liaj genuoj, grave vunditaj antaŭe, denove vundiĝis plurloke. Preskaŭ atinginte la bordon, li eksin-

kis. Tiumomente Song Ping, fotinta la kortuŝan scenon ĉe la bordo, tuj metis sian fotilon surteren, senhezite saltis en la akvon por savi Ŭang. Estis neatendite, ke li mem estis kontuzita de glacia bloko kaj svenis. Tuj poste ili ambaŭ estis savitaj. Ankaŭ Liŭ Ĝanhŭa estis surbordigita.

Tuj ĉe la surbordiĝo, Liŭ estis forportita en apudan domon. Iu demetis sian surtuton kaj kovris lin per ĝi. Kaj sekve juna patrino demetis ruĝan mantelon de sia infano kaj kovris per ĝi la knabon. La estimata patrino, sen sciigi sian nomon, profunde impresis ĉiujn partoprenantojn per sia nobla spirito.

Samtempe kun tio Ŭang Deheng kuŝis svene surtere. Li estis urĝe savata ĉe la loko. Ĝang Ĝjuŝeng estis vundita je pluraj lokoj. Svenis ankaŭ aliaj du ju-

nuloj. La apudestantoj frotis al si la manojn pro maltrankvilo antaŭ tio. Ĝuste en tiu momento iu motorciklisto, informiĝinte pri la akcidento, rapidege kondukis la motorciklon al la loko kaj veturigis la tri gravajn vunditojn al hospitalo.

Ĉe la bordo de la lago multaj demetis siajn vatitajn vestojn, surtutojn kaj velurpantalonojn kaj donis ilin al pli ol dek savantoj elakviĝintaj, ne eldirinte siajn nomojn kaj adresojn. El la vestoj, sakoj, fotiloj kaj aliaj objektoj, metitaj de la savantoj sur la bordo, neniuj estis perdita. Juna kamparano Gaŭ Pejlan kroĉis sian jakon kun 500 ĵuan-oj en la poŝo al arbo ĉe la bordo. La jako estis transdonita unu al alia kaj fine atingis lin, kun la mono bone konservita. Antaŭ sia salto en la akvon iu junulo demetis sian veston, kaj lia brankhorloĝo glitfalas teren nerimarkite. Post kiam li surbordiĝis kaj sin vestis, li trovis la horloĝon en la poŝo.

Tuj post kiam la motorciklo veturigis la tri gravajn vunditojn en la Internacian Pacan Hospitalon fonditan de kanada doktoro Norman Bethune, la medicinaj laborantoj sin ĵetis en urĝan savadon. La servemaj laborantoj organizis kurachelpan grupon kaj haste sin direktis al la akcidenta loko por veturigi ĉiujn aliajn vunditojn.

Gvidate de la vicestro kaj ĉefkuracisto de la hospitalo, la laborantoj bonorde faris la savadon. Dek vunditoj rapide eldangiĝis escepte de Ŭang Deheng, kiu kuŝis en la ĉambro por urĝa savo. Kun ŝvito sur la frunto la laborantoj faris ĉion eblan por savi Ŭang. Li tamen restis sen spiro kaj sangpremo. Ŭang ofe-

(Daŭrigo sur p. 23)

Mi ne estas la plej bona

de **ŜANG ĴONG**

Ŝi, 11-jara lerneĵano de la kvara klaso en elementa lernejo, havas preskaŭ ĉiujn fortaĵojn kaj mankojn de samaĝaj infanoj: neobeema, malcedema, brava, saĝa, diligenta. . . La lernejo, familio kaj socio kune preparis por ŝi brilan vojon. Ŝi kantas, dancas, krias, ridas. . . Kiel ĝoja ŝi estas! Kompreneble, ankaŭ ŝi havas sian ĉagrenon.

La Red.

Mia lernejo situas en tre profunda strateto de Pekino. Oni nomas ĝin Nigrasezama Strateto.

Estas vere, ke mi ne estas la plej bona lerneĵano en la lernejo.

La ĉefinstruistino opinias, ke mi estas iom obstina. Ŝi instruas al ni han-lingvon. Foje ŝi demandis: "Kiun lernobjekton vi plej ŝatas?" Multaj kunlernantoj laŭte respondis: "Han-lingvon." Dume mi diris: "Mi ne amas ĝin." Fakte, mi ŝatas ankaŭ la han-lingvan lernobjekton, kaj mia verketo ĝenerale gajnas la plej altan noton 5. Tamen mi ŝatas ankaŭ aliajn lernobjektojn, kiaj aritmetiko, pentrado, muziko, deklamado kaj sporto. Kial mi amas nur han-lingvon! Mi eĉ kuraĝas, kiel knabo, salti de sur alta teramaso. Ŝajnis al mi, ke la ĉefinstruistino iom malĝojiĝis de mia respondo.

Mi havas multe da malgrandaj mankoj, ekz. mi emas paroli kaj fari petolaĵojn en lecionhoro, manĝi ion en kurspaŭzo, ne enviciĝi survoje al hejmo post lernohoro. Mi ĉiam volas forigi ilin, sed ne sukcesis. En tiu ĉi semestro mi ne estis elektita kiel "bona lernanto", kaj tio tre ĉag-

renis min, sed mi pene detenis min de larmoj. Poste la instruistino diris en la klaso: "Tiu, kiu ĉi-foje ne estas elektita, povas fari klopodojn por fariĝi 'bona lernanto' en la venonta semestro." Fininte la vortojn, ŝi ĵetis rigardon al mi, kaj tuj poste ĉiuj okuloj estis direktataj al mi. Ne povante elteni tion plu, mi ekploris. Mi plorante pensis en mi: Vidu, mi strebos por esti "bona lernanto" venontsemestre.

Ankaŭ paĉjo opinias, ke mi estas iom obstina. Foje mi estis elektita kiel flugpilkistino de la Postlecionna Sporta Lernejo en la Orienta Kvartalo de Pekino. Mi tre ĝojis, ĉar mi ĉiam volis fariĝi

membro de la Ĉina Virina Flugpilk Teamo kia fratino Lang Ping. Sed paĉjo diris, ke mi estas tro malalta por ludi flugpilkon. Li neniel konsentis tion, malgraŭ ke mi kverelis plurfoje kun li. Fine, mi ŝtele iris al la lernejo kelkfoje. Ĉe la vido de miaj ŝveliĝintaj manoj, li sentis grandan kordoloron.

Mi ankaŭ ŝatas danci, kaj tio estas multe kuraĝigata de paĉjo, ĉar li laboras kiel reĝisoro de la Infana Arta Teatro. Li akompanis min al la Postlecionna Baleta Kurso de la Pekina Geknaba Domo por plenumi la eniran ekzamenon. Sed instruistino Ju diris, ke miaj gamboj estas tro

Sang Ĵong rakontas historion al sia patro.





Sang Ĵong en leciono

mallongaj por danci baleton. Ho ve! Kiam la baleta kurso duafoje varbis novajn lernantojn, mi refoje petadis de paĉjo akompani min al la kurso. Instruistino Ju ankoraŭ ne volis min akcepti, sed mi persistis en tio. Paĉjo havis nenian alian rimedon ol peteti ŝin pro mi. Instruistino Ju vole-nevole permesis al mi provlerni en la kurso.

En la komenco mi kaj indignis kontraŭ instruistino Ju kaj timis ŝin. Foje, kiam mi iris survoje, mi rimarkis Ju de malproksime kaj tuj ŝovis min en apudan necesojon. Sed estis neatendite, ke ŝi ankaŭ eniris tuj post mi. Tio ĵetis min en grandan embarason,

kaj mi devis mallaŭte saluti ŝin: "Instruistino Ju."


Fakte, instruistino Ju tre ŝatas min. Mi ĉiam la unua ellernas novajn dancmovojn. Je tio ŝi ofte diras: "Ŝang Ĵong emas cerbumi. Ŝi bone scias trovi la leĝon de novaj movoj. Ŝang Ĵong, dancu antaŭ ĉiuj kaj prezentu kiel vi trovis la leĝon."

Krom danci, en postleciono tempo mi ankaŭ faras volontulan laboron sur strato kune kun aliaj lernantoj. Mi estas unu el la estroj de la Junaj Pioniroj. Foje mi gvidis grupeton por fari serĉon al publiko. Post pli-ol-unu-hora serĉado ni trovis nenion por fari, tio nin treege maltrankvili-

gis. Finfine, iu onklo en almanĝa vendejo permesis al ni viŝi vitrinojn, ni do eksaltis de ĝojo. Unu horo pasis, kaj la vitrinoj brilis. Niaj vizaĝoj nigriĝis, tamen ni ĉiuj tre ĝojiĝis. Tiutage, kiam ni revenis al la hejmo, jam batis la dekokko.

Panjo laboras en ornamaĵa kompanio. Ŝi kaj paĉjo estas tre okupitaj. Mia pliĝa frato lernas en elementa mezlernejo, kaj preparas sin por eniri superan mezlernejon, pro tio li fariĝis persono, kiu ĝuas privilegian zorgon de la tuta familio. Panjo ofte aparte preparas manĝaĵon por li, kaj permesas al li tute liberiĝi de domlaboroj. Li eĉ ne lavas siajn tre malbonodorajn ŝuojn kaj ŝtrumpetojn kaj vokis min kelkfoje kun la tono de mastra moŝto: "ĴongĴong, aĉetu du pecojn da glaciaĵo, prenu la monon." Hm, mi lin neglektis. Sed iom poste mi ne povis deteni min de frandemo, kaj kuris eksteren por glaciaĵo. Kiam panjo revenis hejmen, mi plendis al ŝi: "Panjo, fraĉjo ĉiam laborigas min. Kiam ankaŭ mi povos ĝui tian privilegion?"

Panjo kelkiam subtaksis min kaj prenis min kiel balasteton. Ŝi ofte diris: "Estus bone, se ĴongĴong estus pli aĝa, ĉar mi bezonas helpon en la mastrumado. Ŝajnis al ŝi, ke nun mi ne faras al ŝi helpon. Miaflanke, mi nepre faros ion por ŝin surprizi. Dimanĉe matene, restis nur mi en la hejmo. Mi haste viŝis la fenestrojn kaj tablojn, balais la plankon. . . Fininte la purigon, mi sentis malsaton kaj iris prepari manĝon en la kuirejo. Kiam mi ekbruligis la gasforon, mi sentis timon en la koro. La mano treme proksimigis alumeton al la fajrilo. Timigite de la bruo "pum", mi ekfermis la okulojn. Kiam mi malfermis la okulojn,



mi vidis, ke la flamo jam dancas vige. Mi forte ekscitiĝis kaj preninte seĝon, mi sidiĝis apud la forno pensante, kial la manĝaĵo ankoraŭ ne estas pretigita. Dudek minutojn poste mi malfermis la kovrilon, kaj bonodoro tuj tiklis mian nazon.

Ĝuste tiam, panjo revenis. Vidante ĉion ĉi tion, ŝi diris kun miro kaj ĝojo al nia najbaro onklino Ĝang: “Nia ĴongĴong jam fariĝis mia malgranda helpanto!”

Aŭdinte tion mi sentis min feliĉa en la koro.

Ŝang Ĵong (la meza) lernas dancarton en geknaba domo.

(Daŭrigo de p. 20)

ris sian vivon, por ke la aliaj vivu bone. Vidante lin, preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj ploris de emociiĝo.

Ia nokto pasis kun maltrankvilo. Frumatene de la sekvanta tago aŭdiĝis la kortuŝa afero ĉie en la provinca ĉefurbo. Respondeculoj de la provinco kaj urbo pretis viziti la vunditojn. Raporlistoj planis intervjui ilin. Sed je la sesa matene ses vunditaj laborantoj de la Ŝenĵang-a Lokomotiva Sekcio, kiuj partoprenis en la savado, jam senbrue forlasis la hospitalon. Ili venis de la Nord-oriento por ofica vojaĝo. Kiam okazis la akcidento, ili senhezite sin ĵetis en la savadon. Post tio vekiĝis Gaŭ Pejlan. Li trovis retsakon da pomoj kaj ladmanĝaĵo sur la tablo. Post provado de sia korpo li sentis la vundon negrava, kaj forlasis la hospitalon sen konsento de kuracisto. Antaŭ sia foriro, la juna kamarano portis la manĝaĵon en la malsanulan ĉambron kie kuŝis Liŭ Ĝanhŭa.

Sub la retsako li metis slipon: “Mi akceptas vian komplezon, tamen estas bone lasi la manĝaĵon al la knabo por lia baldaŭa resaniĝo.”

La savantoj venis de diversaj partoj de la lando, kaj nun forveturis al siaj hejmlokoj. Post

longa klopodado la registaro kaj novaĵagentejo de la urbo trovis iujn el ili kaj esprimis al ili siajn dankon kaj laŭdon. La urba registaro alvokis, ke la tuta urbo lernu de la sinoferema heroo Ŭang Deheng, kaj decidis starigi por li steleon ĉe la bordo de la lago por eterne memorigi pri li.

Saviĝis la knabo, sed ses el la savantoj falis en la akvon. Jen du junuloj (maldekstre) per bambua stango eltiras falintojn.



Ili partoprenos en la Olimpikoj



Ĝu Ĝjanhŭa

POST pli ol unu monato ĉinaj sportistoj partoprenos en la Someraj Olimpikoj de tiu ĉi jaro. Por tio ili streĉe sin ekzercas nun. Antaŭ ol ili venos al Los-Anĝeleso, ni prezentas al niaj legantoj kelkajn el ili.

ĜU ĜJANHŬA, KIU PLEJ ALTE SALTAS EN LA MONDO

La 21-jara altosaltisto Ĝu Ĝjanhŭa altas je 1.93 metroj, kun simetria staturo kaj rektaj, fortaj gamboj.

La 6-an de junio, 1981, en la Kvara Azia Atletika Konkurso en Tokio li facile transsaltis la alton de 2.30 metroj. Tion vidinte, la prezidanto de la Internacia Amatora Atletika Federacio kun espero antaŭdiris, ke li fariĝos la plej alte saltanta homo en la mondo. Lia antaŭdiro efektiviĝis. En la Kvina Tutlanda Sportkunveno en 1983 Ĝu Ĝjan-

hŭa dufoje rompis la mondan rekordon de 2.36 metroj, tenitan de altosaltisto de la Germana Demokratia Respubliko, per 2.37 kaj 2.38 metroj.


En 1973, kiam li komencis altosaltan trejniĝon, li povis transsalti la alton de nur 1.1 metroj. Post du jaroj, en la Ĉina-Japana Geknaba Atletika Konkurso, li transsaltis la alton de 1.61 metroj. En la komenco de la okdekaj jaroj li fariĝis membro de la Ŝanhaja Atletika Teamo. Ĉiujare li levis sian transsaltitan alton je 5.5 centimetroj. La 1-an de decembro 1982, en la Naŭa Azia Sportkunveno li transsaltis la alton de 2.33 metroj, kio metis al li fundamenton por krei mondan rekordon.

“MARTELO” LANG PING

La ĉina flugpilkistino Lang Ping, kiu ĵus atingis la aĝon de 23 jaroj, jam famiĝis en la inter-

nacia flugpilka rondo. Oni laŭdis ŝin kiel “Martelon” de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo.

Antaŭvespere de la Oka Azia Sportkunveno en 1978 Ĵuan Ŭej-min, trejnisto de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, decidis partoprenigi ŝin, flugpilkan novulon, en la sportkunveno. En la intensa konkurso ŝi faris fortajn frapojn kaj akuratan blokadon, kio mirigis la spektantojn, kaj la internacia flugpilka rondo rigardis ŝin “nova armilo de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo”. Tiam ŝi havis apenaŭ 18 jarojn. Post unu jaro, en la Dua Azia Virina Flugpilka Konkurso, ŝi kaj ŝiaj kamaradinoj venkis la Japanan Virinan Flugpilkan Teamon, “Magian Virinon de la Oriento”, kaj gajnis la ĉampionecon de la azia virina flugpilkado. De tiam la bela nomo “Martelo” disvastiĝis tra la tuta Ĉinio. En la Tria Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso en 1981 ŝi senĉese gajnis poentojn por la ĉina teamo per siaj pezaj frapoj, granda rapideco kaj variemaj taktikoj. La statistiko diris, ke en la finalo inter la ĉina kaj japana teamoj ŝi faris 97 mortajn frapojn kaj en la finalo inter la ĉina kaj usona teamoj ŝi pafis 102 “pezajn obusojn”. Dank’ al sia bonega ludado ŝi ricevis premion por elstara sportistino. En la Naŭa Monda Virina Flugpilka Ĉampionea Konkurso ŝi faris grandan kontribuon, por ke la Ĉina Virina Flugpilka Teamo gajnu la mondan ĉampionecon. “Martelo” nun estas vicestro de tiu teamo kaj senĉese progresas.




U Šude

JUNA HERKULO U ŜUDE

Depost 1978 U Ŝude sesfoje rompĉis la mondajn rekordojn de junula halterlevo kaj dufoje starigis la mondajn rekordojn de dumana ŝirlevo. En la Kvina Tutlanda Sportkunveno en septembro 1983 li per 128 kg. rompĉis la mondan rekordon de dumana ŝirlevo je 56-kilogramama pezkategorio.

U Ŝude komencis ekzerci sin per halterlevo en sia 14-jara aĝo. En la Kvara Monda Junula Halterleva Ĉampioneeca Konkurso en 1978 li gajnis la unuan lokon de dumana ŝirlevo je 52-kilogramama pezkategorio. En 1979 li trifoje kreis la mondajn rekordojn de junula dumana ŝirlevo je 52-kilogramama pezkategorio en Grekio, Hungario kaj Ĉinio. En la Azia Halterleva Ĉampioneeca Konkurso okazinta en 1981 en Nagoya de Japanio li per 126.5 kg. rompĉis la mondan rekordon de dumana ŝirlevo je 56-kilogramama pezkategorio. Tiu tago koincidis



Lang Ping (la plej supra)

kun la 24-a datreveno de lia naskiĝo.

LA MONDA GIMNASTIKA ĈAMPIONO LI NING

En la Sesa Mondpokala Gimnastika Konkurso en 1982 la ĉina gimnasto Li Ning kreis miraklon en la gimnastika historio: Li sola gajnis ses orajn medalojn.


Li Ning eklernis gimnastikon en sia ok-jara aĝo. Li debutis en la Ĉina Knaba Gimnastika Konkurso en 1972. Post kiam li fariĝis membro de la ĉina gimnastika teamo en 1980, li montris sian talenton en internaciaj konkursoj. En la grundgimnastika konkurso de la Dekunua Monda Studenta Sportkunveno li faris

du transkapiĝojn sin turnante je 360 gradoj, sekve du transkapiĝojn malantaŭen kun fleksita korpo kaj Tomas-turnojn sur tapiŝo, kio mirigis la rigardantojn. En la Naŭa Azia Sportkunveno en 1982 li gajnis tri ĉampioneojn de individua kunmetita konkurso, ĉevalado kaj durinĝado.

Kvankam li malsukcesis en la Naŭa Usonpokala Gimnastika Konkurso en marto ĉi-jare, tamen li diris, ke li klopodos atingi bonajn sukcesojn en la Someraj Olimpikoj de la kuranta jaro.


“AERA DANCISTINO” ĈEN ŜJAŬŜJA

En la 8-a de septembro 1979 iris la Dekna Monda Studenta



Ĉen Ŝjaŭŝja

Sportkunveno en Meksikio. Je la tria posttagmeze ĉina sportistino aplombe suriris sur turon dek metrojn altan. Ŝi eksaltis kaj finis serion da elegantaj movoj



Li Ning

en la daŭro de momento. Kaj poste ŝi facilmove enakviĝis kaj restigis sur la akvosurfaco nur ondetojn. Ĝuste je tio eksplodis huraado kaj manklakado de la rigardantaro. La plonĝinto nomiĝis Ĉen Ŝjaŭŝja, kiu estis 17-jara. Ŝia bela plonĝo faris sensacion en Meksiko. Ŝi gajnis la oran medalon unuan por Ĉinio en la monda plonĝa konkurso.

Kiam ŝi estis 12-jara, ŝi eklernis plonĝon en sporta lernejo. Post tri jaroj ŝi jam povis fari

iujn malfacilajn movojn, kiel unu- kaj duon-turna transkapiĝo malantaŭen kaj tri-kaj-duon-torda saltumo, kiuj siatempe ne estis viditaj en la mondo. En 1978 ŝi unuafoje partoprenis en internacia konkurso. Poste ŝi gajnis la ĉampionecojn en turoplonĝo en la Dekaj kaj Dekunua Mondaj Studentaj Sportkunvenoj. Ŝi gajnis la orajn medalojn de turoplonĝo en la Kanada, Usona kaj Meksikia Internaciaj Plonĝaj Invitaj Turniroj en 1982.

NOVA GAZETO EN
ESPERANTUJO—NOVA VOĈO

VOĈO DE
HANDIKAPULOJ

Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Luksa papero. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa. Kunlaborantoj tra la tuta mondo!

Redaktas:

Duŝan Adnadj kaj Vujadin Lukić

Jen aŭdu nian VOĈOn! VOĈO ne lamentas, ĝi: diskutas, rekomendas, provokas, malkovras, polemikas, helpas, proponas, rakontas, recenzas, konsilas, komentas, argumentas kaj movadumas.

Nia VOĈO estas io nova—VOĈO por ĉiuj—tio estas via VOĈO

Jarabono: 12.-DM, 5 US\$ aŭ egalvaloro. Jarabonon bonvolu direkti per poŝtenpagilo al adreso: "Voĉo" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio. Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuaj kaj informoj.

La Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero


Fotoj de GAŬ ŜENKANG

La montpinto "Diino"






Čjutang-montgorĝo



Ušja-montgorĝo

Šjiling-montgorĝo



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Abadan-bordo de la rivero Karun
de **S. MOHAMMADZADEH** (Irano)



Malofta mirinda vintra-printempa panoramo en la kamparo Castelbuono de Italio
de s-ino **ADA CANNATA** (Italio)



La pitoreskaj Tri Montgorĝoj

de ĈANG ĜOŬ

JANGZI, la plej longa rivero de Ĉinio, fontas de la “Monda Tegmento” — la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo. Ĝi enprenas en sin la riverojn Mingĵang, Tŭoĝĵang, Ĝjaling kaj Uĝĵang en la Siĉŭan-a Baseno kaj nehaltigeble torentas orienten. Ĝia torento formis la fame konatajn Tri Montgorĝojn inter la montoj de la provincoj Hubej kaj Siĉŭan.

La Tri Montgorĝoj estas ĉarma kaj mirakla galerio sur la turisma linio de Jangzi-rivero, komenciĝas de la urbo Bajdi en Fengĝe-gubernio de Siĉŭan-provinco en la okcidento kaj finiĝas ĉe Nanĝingŭan de la urbo Jiĉang de Hubej-provinco en la oriento. La montgorĝoj kun totala longeco de 192 kilometroj konsistas el la tri mallarĝaj ravinoj Ĉjutangŝja, Uŝja kaj Ŝjilingŝja kaj la tri larĝaj valoj Daninghe, Ŝjangŝji kaj Mjaŭnan, alterne vicigitaj.

Ĉjutangŝja je ok kilometroj longa estas la plej mallonga el la Tri Montgorĝoj, sed aspektas plej impona kaj kruta. Tie la rivero larĝas nur je 100-200 metroj, eĉ je kelkdek metroj, sed la ĉefaj montpintoj ĉe ambaŭ bordoj altas je 1 000-1 500 metroj. Inter la krutaj montoj la rivero ruliĝas antaŭen kiel strio da rubando.

Ambaŭborde de Ĉjutangŝja sin trovas multaj vidindaj lokoj. La plej fama el ili estas la urbo Baj-

di, kiu staras sur la montsupro de la norda bordo. Tuj trapasinte Fengĝe per ŝipo orienten, oni povas vidi, de malproksime, la urbon kun multaj antikvaj konstruaĵoj inter verdaĵoj. La urbo frontas al riveroj en tri flankoj kaj dorse al monto, ĝi vidiĝas ĉarma en la imponaj montgorĝaj pejzaĝoj. Jam en la unua jarcento p. K. Gongsun Ŝu okupis la regionon Ŝu (la nuna Siĉŭan-provinco) kaj konstruigis la urbon sur la monto. Ĉar tie estis mirinda puto, el kiu ofte eliĝis blanka vaporo kvazaŭ fluganta blanka drako, li do titolis sin Blanka Imperiestro kaj la urbon Bajdi (ĉin-lingve blanka imperiestro). Post lia morto la lokanoj konstruis por li la templon Bajdi sur la monto. Por atingi la templon oni devas grimpi ĉ. mil ŝtonŝtupojn. La templo estis riparita de postaj dinastioj kaj nun ankoraŭ havas konstruaĵojn de post la 16-a jarcento. En ĝi konserviĝas kaligrafiaj kaj pentraĵaj steleoj, pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj de diversaj dinastioj, inter la steleoj la plej frua jam havas historion de pli ol 1 300 jaroj. La urbo Bajdi fakte estas muzeo de la Tri Montgorĝoj.

La rivero fluas el la montgorĝo Ĉjutangŝja, enprenas en sin la riveron Daning en Uŝan-gubernio kaj poste fluas en la montgorĝon Uŝja. La rivero torentas en la kurba mallarĝa valo je 45 kilo-

metroj longa inter groteskaj montpintoj. La famaj 12 imponaj pintoj de la monto Uŝan alte staras ambaŭborde. Kiam pasaĝera ŝipo trapasas la montgorĝon, preskaŭ ĉiuj turistoj elŝipiĝas por apreci la ĉarmajn pejzaĝojn. La plej alloga el la 12 montpintoj estas la montpinto Diino ĉe la norda bordo. Sur la montpinto staras alta ŝtonkolono kvazaŭ svelta knabino, tial oni nomas ĝin montpinto Diino.

Inter la popolanoj cirkulas multaj belaj legendoj pri la montpinto Diino. Unu el ili rakontas: En la malproksima antikveco Jaŭ Ĝji, la 23-a filino de Diino Ŝjiŭangmu, estis viglema kaj enua pri la soleca vivo en la Fea Palaco. Iutage ŝi venis al la tero kun siaj sekvantoj. Tiam altaj montoj ŝtopis la montgorĝon Uŝja kaj la rivero inundis vilaĝojn kaj kampojn. La akvo-brida heroo Ŝjaju gvidis popolanojn haki la monton por dreni la superakvon. La persistema spirito de Ŝjaju kortuŝis la diinon, ŝi ordonis siajn sekvantojn helpi per dia forto la heroon en la monto-hakado. Post forkonduko de la superakvo ŝi ne volis forlasi la lokon kaj staris sur la montpinto por montri al la ŝipistoj navigan direkton kaj feliĉigi la popolanojn per pluvado. Pasis multaj jaroj, ŝi fariĝis la montpinto Diino, kaj ŝiaj sekvantoj transformiĝis en la aliajn mont-

pintojn, kiuj senbrue gardas ŝin ĉirkaŭe. Tiuj montpintoj ĉiam ĉirkaŭataj de nuboj aspektas tre ĉarmaj kaj misteraj.

Inter Uŝja kaj Ŝjilingŝja troviĝas larĝa valo Ŝjangŝji longa je 47 kilometroj, malaperis iom post iom ambaŭbordaj krutaj rokmuroj kaj la rivero fariĝas larĝa. Antaŭ la okuloj prezentiĝas ŝtuparaj kampoj kaj oranĝaj ĝardenoj unuj super aliaj ĉirkaŭataj de montoj. La vasta kamparo ravis multajn turistojn per lirika pejzaĝo de la Tri Montgorĝoj.

En la valo Ŝjangŝji troviĝas la naskiĝlokoj de Ĉju Jŭan kaj Ŭang Ĝaŭĝjun. En la jaro 540 a. K., Ĉju Jŭan, la plej granda patriota poeto de Ĉinio, naskiĝis en la gubernio Ziguj en tiu valo. Li estis kortegano de Ĉu-regno kaj ofte maltrankviliĝis pri la ŝtataj aferoj kaj popolaj suferoj, tamen li estis plurfoje kalumniita de insidemaj korteganoj. Fine li estis ekzilita kaj indigne sin dronigis en riveron. Sed Ĉju Jŭan postlasis eternajn poemojn kaj ĝuis altan reputacion en la monda kultura historio. Memore

al li la lokanoj konstruis Ĉjujŭan-domon kaj Ĉjujŭan-templon. Ŭang Ĝaŭĝjun estis eksterordinara belulino de kamparana familio ĉe la rivero Ŝjangŝji. Poste ŝi estis sendita en la imperiestran palacon. En la jaro 55 a. K. ŝi volonte edziniĝis al Huanja, la reĝo de hunoj. Per tio ŝi faris sian kontribuon por starigi la amikan kaj pacan rilaton inter la hanoj kaj hunoj. La loka popolo amis ŝin kaj en ŝia naskiĝloko konstruis la altanon Ĝaŭĝjun, sur kiu staras okangula kiosko kaj steleo kun gravurita poemo pri ŝi.


Se oni plu veturas orienten, oni eniras la montgorĝon Ŝjilingŝja je 66 kilometroj longan. Ĝi estas dividita de larĝa valo en du partojn orientan kaj okcidentan. En tiu parto la rivero famas pro multaj malprofundaj kaj rapidaj torentoj. Iuj malprofundaj estis falintaj rokoj, kaj aliaj rifoj en la riverfundo. Tie ruliĝis kiroloj kaj furiozis ondegaj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro faris ordigadon al tiu danĝera parto. Nun oni ŝipveturas sekure ne nur tage, sed ankaŭ nokte.

La montgorĝo Ŝjilingŝja estas abunda je karstaj kavernoj. Laŭ statistiko la Tri Montgorĝoj havas pli ol 200 kavernojn, el kiuj 174 troviĝas en la orienta parto de la montgorĝo Ŝjilingŝja. Iuj el ili sin trovas tuj ĉe la bordo, aliaj ĉe monttalo kaj triaj proksime al montsupro. La kavernoj havas diversformajn stalaktitojn kaj stalagmitojn. En la homa kavernoloĝa epoko ili estis lulilo de la Tri-montgorĝa Kulturo. En tiuj mitaj kavernoj oni trovis ostpecojn, armilojn, fiŝkaptilojn kaj ĉasilojn de prahomoj. Ili ne nur altiras al si multajn turistojn, sed ankaŭ servas kiel esploro de homa kulturo kaj geografio.

Oriente de la pasejo Nanĝingŭan la rivero Jangzi plilarĝas de ĉ. 500 metroj ĝis pli ol 2000 metroj. La pejzaĝoj en kaj ekster la pasejo estas tute malsamaj. Ili impresas turistojn per la krutaj montoj en la montgorĝoj kaj la vasta ebenajo ekstere. Nun antaŭ la turistoj leviĝas la unua giganta barajo Geĝoŭba de Jangzi-rivero. Ĝi jam fariĝis unu el la vizitindaj lokoj en vojaĝo al la Tri Montgorĝoj.



Montgorĝo Uŝja



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Ladi Kralovec, Ceska Kubice 77, 344 00 Domazlice, Ĉeĥoslovakio, 60-j. pensiulo, deziras korespondi pri diversaj temoj tutmonde kun ĉiu. Kolektas ankaŭ bildkartojn.

* Aĉetsekciestro (elektromotor-fabriko), 47-jara, serĉas esperantoparolantan vendiston de varoj/pecoj bezonataj al nia fabrikado. Ni povus praktiki Esperanton ĉe komerca korespondado. Franz Braun, Hornisgrindestr. 8, D 7580 Bühl 16, FR Germanio.

* Mi serĉas homojn, kiuj por mi kontraŭ bona pago aŭ rekompence de aliaj deziritaj tekstilaĵoj el nia lando manlaboras. Mi preferas gobelinon, krucstilajn kudrerojn, broditaĵojn, perlajn broditaĵojn, ktp. Materialaĵojn mi povus sendi. By. direkti vian proponon al s-ino Rita Bloom, Am Kirchensiek 29, D-3370 Seesen-1, Fed. Resp. Germanio.

* 16-j. junulo de Germanio volas korespondi kun ĉinaj en Esperanto, la angla aŭ en (mallonga) ĉina. Thomas Sieberichs, Wilhelm-Stefen-Str. 91, 4150 Krefeld-Fischeln, FRG.

* S-ro Batzaya Isetsegalziyn, post restante-Ts. Batzaya, Central post Ulan-Bator, P.R. Mongolio, volas korespondi kun ĉino Esperante, angle kaj germane, pri scienc-fikcio.

* Kelkaj diversaĝaj geesperantistoj de la E-grupo el la ĉebaltmara urbo ROSTOCK, deziras korespondi kun esperantistoj el Ĉinio pri div. temoj, ekz. ekonomio, kultur-historioj, politiko k E-movado ktp. Skribu al: Distr. Estraro E-to DDR 2500 — ROSTOCK 1 Kröpelin Str. 25 (Germ. Dem. Respubliko).

* Kun mezaĝaj gesamideanoj dez. kor. tm. pri ĉ. t. Izabela Leśniewska, Daniowskiego 3/46, P1 94-208 Lodz, Pollando.

* 20-j. studentino pri historio, deziras korespondi tutmonde. Adreso: France Cadieux, 10530 Paris, Montréal-Nord, Québec, Kanado, H1H 4K2.

* Deziras korespondi kun ĉina kuracisto 54-j. kuracisto mensa Sakaŭa-ĉoo, Takaoka-gun, Kooĉiken, Japanujo 879-12.

* Polaj geklubanoj kaj infanoj deziras korespondi tutmonde precipe pri muziko, turismo, fotado kaj aliaj temoj. Aĝo 14-40j. Respondo certa. A franku bele koverton. S-ano Janusz Motykiewicz,

Esperanto-Klubo de PEA, PL-67-240 KOTLA, Pollando.

* Mezaĝa virino, ekonomiistino, kun multaj interesoj dez. trovi veran korespond-amikon (inon) t.m. Irena MIODYNSKA Kościuszki 32/5, PL-44-100 GLIWICE, Pol-ska.

* Dudekunujara studento Miran Košar (YU3GL) deziras kor. tutmonde pri radiokomunikado kaj komputeroj (Kalkulatoroj) en Esperanto aŭ en la angla kaj germana lingvoj. Poŝtkesto 22, 62000 MARIBOR, Jugoslavio.

* Pola knabino 14-jara Joanna Ladomirska vol. kor. kun knab(in)o pri historio kaj matematiko precipe pri veturo. Adreso: 334 Wugoda, 38-213 KOLACZUCE, Pollando.

* Mi vol. kor. kun lernant(in)o de 9-a klaso. Adreso: Lanlo Maria Edith, Lasaresti n-ro 64, 4119 Hasgluta, Romanio.

* 67-jara hungara esperantisto vol. kor. kun ĉina esperantisto. Endrenyi Imre, Szekozard, Kadar-ka etp. 4 foz. 2, 7100 HUNGARIO.

* 19-jara fraŭlo dez. kor. kun japanaj, italaj, francaj germanaj ktp. pri pm.-bk.-verkoj (poemo, muziko, arto ktp.). Adreso: Mehran Khakpour, 236-Ferdonsi ST 11, SHAHIN SHANRESFAHAN, Iran.

* 68-jara pensiulo Herman Berglund, Slättervägen 8, 73135 Köping, Svedio deziras kor. tutmonde pri literaturo, naturo, kulturo, muziko, vojaĝado kaj div. temoj.

La baraĵo Geĝoŭba estas konstruita en la komenco de 1981, kaj malfermiĝis al trafiko kaj komencis liveri elektron en junio samjare. Ĝi havas longecon de 2 561 metroj. Ĝiaj du elektrejoj

povas produkti ĉiujare 14.1 miliardojn da kilovattoroj da elektro por centra Ĉinio. La baraĵo estas nur konsistiga parto de la estonta akvomastroma pivota sistemo de la Tri Montgorĝoj. Ĝi

certe faros pli multajn bonojn al la popolo en la estonteco. Tiam la Tri Montgorĝoj fariĝos ankorau pli belaj.



Gimnastiko por kuraci bronkan astmon

de ŬANG JUJŬAN

BRONKA astmo estas alergia malsano kun simptomoj de astmobruo kaj tusado. La malsanulo ofte sentas malfacilan spiradon pro ŝveliĝo de la muka membrano de la dukto kaj multiĝo de densa sekrecio el la dukto-interno. Pli serioze estas, ke tiu malsano povas kaŭzi pulman emfizemon, se ĝi daŭras longtempe. Por kuraci la malsanon, krom preni medikamentojn, oni povas ankaŭ apliki fizioterapion kaj aliajn metodojn.

Ĉi-sube ni prezentas al vi bon-efikan kaj facile fareblan gimnastikon por kuraci tiun malsanon. Ĉiu seanco daŭras 10-15 tagojn. Post kelkaj seancoj la suferanto ricevos rimarkeblan pliboniĝon: malaperos spira perturbo kaj reduktiĝos la turmento de astmo. La efiko estas des pli rimarkebla por iuj suferantoj, kiuj kaj faras gimnastikon kaj prenas medikamentojn. Post unu aŭ du monatoj malaperas al ili astmo. Se oni antaŭsentas, ke astmo baldaŭ okazos, oni povas tuj fari gimnastikon por preventi ĝin. La fojoj kaj intenseco de gimnastado en ĉiu tago estu deciditaj laŭ la stato de malsano. La gimnastiko estas farata laŭ la jenaj paŝoj:

1. Kuŝi dorse, malstreĉi la korpon, meti la manojn sur la subventron kaj stomakon, malra-

pide spiri profunde 1-2 minutojn kun malforta premo al la abdomeno.

2. Kuŝi dorse, meti la brakojn ambaŭflanke de la korpo. Enspiri kun la manplatoj malsupren kaj la piedpintoj internen; poste elspiri kun la manplatoj supren kaj la piedpintoj en inversaj direktoj. Ĉe la dua enspiro turni la manplatojn malsupren kaj tiri la piedpintojn internen. Tiel ripeti la movojn 7-8 fojojn.

3. Kuŝi dorse, enspiri kun la brakoj etenditaj ambaŭflanken de la korpo kaj la manplatoj supren. Dum elspiro teni la kruojn senmovaj kaj turni la supran korpon flanken, ĝis la du brakoj estas kunmetitaj. Poste fari enspiron kaj repreni la komencan pozon. Tiel ripeti la movojn alterne 7-8 fojojn.

4. Kuŝi dorse, fari enspiron kun la kruoj senmovaj kaj per la manoj teni ambaŭflanke la talion. Ĉe elspiro malrapide fleksi la genuojn, ĉirkaŭpreni ilin kaj malforte alpremi ilin al la abdomeno. Poste, ĉe la dua enspiro preni la komencan pozon. Poste ripeti la movojn 7-8 fojojn.

5. Kuŝi dorse, fari enspiron kun la kruoj senmovaj kaj la brakoj levitaj super la kapon. Ĉe elspiro rektigi kaj levi unu el la

gambroj kaj tuŝi la genuon per ambaŭ manoj. Poste movi la alian gambon en la sama maniero. Tiel ripeti la movojn alterne 7-8 fojojn.

6. Kuŝi dorse, fari enspiron kun la kruoj senmovaj kaj la brakoj levitaj super la kapon. Ĉe elspiro sidigi la torson kaj tuŝi per la manoj la piedpintojn kaj per la brusto la genuojn; poste ĉe la dua enspiro rekuŝiĝi kaj meti la manojn super la kapon. Tiel ripeti la movojn 7-8 fojojn.

7. Kuŝi dorse, enspiri senmove, poste elspiri kun la brusto ĉirkaŭprenita de ambaŭ brakoj.

8. Sidi, malpeze meti la manojn sur la ventron kaj nature spiradi 1-2 minutojn.

Farante la gimnastikon oni devas atenti:

1. La spirado devas esti natura, egalmezura kaj ne-retenata.

2. Oni povas fari la gimnastikon 1-3 fojojn ĉiutage, krome, necesas ankaŭ promeni aŭ fari mildan sporton laŭ sia propra sanstato.

3. Antaŭ ol fari la gimnastikon, oni devas aerumi la ĉambbron. Sed por la gravaj malsanuloj necesas varmeta ĉambro.

4. Elspirante oni povas eligi "A", "U" kaj similajn sonojn.

KAJ JUAN:

Prikantanto de la naturo

— PRI KSILOGRAFO MO CE



Mo Ce

GERMANA filozofo Kantio diris: “Mi opinias, ke la intereso rekta por la beleco de la naturo (ne nur la kritika apreco pri ĝi) ĉiam estas marko de bela kaj bona animo.” Tiuj vortoj estas ne troaj por priskribi la ĉinan pejzaĝan ksilografon Mo Ce kaj liajn verkojn.

Antaŭ ksilografajoj de Mo Ce mi staris kvazaŭ vizaĝe al vivoplena mondo, mi sentis viglan


vivopovon en kvieteco, kontenton kaj ĝojon alportitajn de liaj energia krea deziro kaj laborado.

Mo Ce naskiĝis en 1928, ĉe Hongze-lago de Ĝjangsu-provinco, Ĉinio. Li ekamis pentradon jam en la infaneco, sed ne vizitis belartan lernejon. Li sukcesis en ksilografio ĉefe per postlabora memlernado dum la jaroj, en kiuj li laboris kiel redaktoro kaj laboranto de ekspozicioj. Ekde

1955, en kiu li kreis sian unuan koloran ksilografajon “Fiŝado”, iom post iom formiĝis lia originala stilo. Iuj el liaj eminentaj kreaĵoj estis multfoje eksponitaj en belartaj ekspozicioj en- kaj eksterlandaj kaj estis alte taksitaj.

Mo Ce laboris longtempe en akvoadministra kaj elektra departemento, tial li ofte havis ŝancon iri al konstruejoj en diversaj lokoj de la lando, la grandiozaj pejzaĝoj de la patrolando prezentis al lia verkado abundajn materialojn. Sekve reaperigi reformitan naturan belecon fariĝis temoj de liaj pejzaĝaj ksilografajoj. En

Paŝtista Flutado (Nigra-blanka lignogravuraĵo)



Pormorusfolia Boato (Nigra-blanka lignogravuraĵo)



presentado de tiuj temoj, li neniam kontentiĝas je sekvado de la malnovaj formoj; male, li kuraĝe kreis novajn verkaĵojn, aplikante diversajn prezentajn manierojn laŭ malsamaj enhavoj. En liaj ksilografaĵoj la akvokonservejo, akvobaraĵo, hipertensia lineo kaj artefarita ebenaĵo ktp, estis lerte teksitaj kun altaj montoj, torento kaj fekundaj kampoj. Ili formis belan tuton harmonian kaj donis apartan artan efekton. Tiu klara tendenco montriĝis en liaj ksilografaĵoj ĉu koloraj, ĉu nigra-blankaj.

Mo Ce estas prikantanto de la naturo. Delikata kaj akrevida estas lia observado al la bela naturo, al la formoj kaj enhavoj de la vivo, kaj al la varioj de la koloroj, lumoj kaj ombroj.

Plejparto de la verkoj de Mo Ce havas priskribon pri akvo. Ankoraŭ pulsas ritmoj kaj taktoj de akvo, eĉ se li ne rekte priskribis riveron, lagon aŭ maron en siaj ksilografaĵoj. En liaj verkoj "Nokta Irigaciado" kaj "Fiŝistaj Lumoj en Akvokonservejo" videblas ne nur rebrilo de kvieta aŭ fluanta akvo, sed ankaŭ la luno, lumo de fiŝboato kaj lamplumo

ĉe bordo, kiuj flagris per lirikeco. En lia verko "Nova Loĝpunkto", loĝdomoj kaj vojoj sub verdaĵoj sur kruta monto, alta akvedukto, elegantaj bambuaroj, infanoj irantaj al lernejo kaj malklaraj foraj montoj . . . imagigis pri akvo ekster la vidkampo.


Estas diro, ke "la montoj kaj akvoj en Gujlin kronas la mondon, dume tiuj en Jangŝuo estas pli ĉarmegaj". La ksilografaĵa serio de Mo Ce "Pejzaĝoj de Liĝjang-rivero" povas facile konduki rigardantojn en ĉarman pitoreskejon ambaŭborde de Liĝjang-rivero proksime de Jangŝuo. Tiuj 12 ksilografaĵoj estas malsamaj unu al la alia en kolor-nuancoj, medioj kaj esprimmanieroj. Per sia aparta percepto, li reaperigis la delikatan ŝanĝiĝon de Liĝjang-rivero en mateno, vespero, pluvo, roso. . . en diversaj sezonoj. Kia arta ekstrakto plena de sentimentoj!

En verkado Mo Ce sincere lernis de la ĉinstila pentroarto, popularaj papertondaĵo kaj aliaj tradiciaj artospecoj por riĉigi la prezentan kapablon kaj altigi la dekoracian efikon de siaj verkoj. Tio montriĝas precipe en liaj ni-

gra-blankaj ksilografaĵoj. Multaj el liaj verketoj estas tre interesaj, plaĉaj kaj aprecindaj. Lia verko "Morusfolia Boato" pri kampara vivo de suda Ĉinio asimilis la manieron de papertondaĵoj kaj plene profitis el origina metodo de ksilografio. La bildo havas harmonian strukturon, simetriajn liniojn kaj drastan intencon de dekoracio. Lia alia verko "Veloj sur Tajhu-lago", kiu prezentas ankaŭ pejzaĝon de suda Ĉinio, havas dikan strukturon, akrajn liniojn kaj specifan guston, kaj evidentigas asimilon de tekniko de la ĉina antikva ŝtongravuro. La naŭ velŝipoj estis majstre lokitaj en diversajn, sed klare distingeblajn nuancojn.

La teorio de ĉinstila pentroarto ĉiam emfazas lernadon de la naturo, kio estas la bazo de interrilato inter la ĉina arto kaj la naturo kaj formis la nacian stilon de naturalisma prezentado de la naturo. Kvankam la ĉina moderna ksilografika arto flegata de la ĉina granda verkisto Lusin havas historion de ĉirkaŭ 50 jaroj, tamen en tiu sfero jam aperis granda nombro da ksilografoj. Ili heredis la elstaran tradicion de la ĉina plastiko per siaj verkoj kaj montris de diversaj flankoj la amon al la naturo kaj vivo. Mo Ce estas unu el ili. Li aldonis brilon al la ĉina moderna ksilografika arto.

Nun Mo Ce estas en sia flora periodo de verkado kaj senĉese omaĝas novajn verkojn. Iu fama japana ksilografisto faris al li ĝustan takson: "Liaj verkoj ne nur karakteriziĝas per pura, modesta kaj revolucia stilo de ĉinaj ksilografaĵoj, sed ankaŭ estas plenaj de perfekta kaj brila sento al la naturo kaj homoj. La multeco de la tekniko, la lojaleco kaj la korduŝeco eksplikas la ĉiaman stilon de modesteco."



Ĉe Riverbordo
(Nigra-blanka lignogravuraĵo)

Ŝaŭŝing-vino

ŜAŬŜING-VINO, produktaĵo propra al Ĉinio, estas nomata ankaŭ flava vino. Ĝi estas produktata en la antikva urbo Ŝaŭŝing de Ĝeĝjang-provinco.

La ĉina alkoholaĵo havas tri specojn: flava vino, blanka brando kaj vino. El ili la unua aperis plej frue, laŭ historia literaturo, en la sepa jarcento a.K.

La sukcen-kolora Ŝaŭŝing-vino estas farata per distilado de nature fermentinta rizo aŭ milio. Ĝi, forte aroma, ĝenerale havas 15-20% da alkoholo. La vino estas tre nutra por la homa sano, ĉar ĝi entenas plurspecajn substancojn graso, sukero, mineralaj elementoj kaj pli ol 20 aminajn acidojn, ĉefajn elementojn de proteino. Ili utilas al la apetito, digesto kaj senlaciĝo.


La akvo bezonata en la vinfarado estas ĉerpita el Ĝjanhu-lago, sudokcidente de la urbo Ŝaŭŝing. Fontanta ĉe la piedo de Gujĝjimo kaj filtrita tra sabla stratumo, la akvo fariĝis dolĉa kaj purega. Estas interese, ke se oni metas monerojn en la glason plenan de akvo el Ĝjanhu-lago, la akvo leviĝas je du milimetroj pli alte ol la glasa rando, tamen ne elfluas el la glaso. Produktita el tia akvo, Ŝaŭŝing-vino sendube estas aparte aroma.

La vino ofte estas uzata por maceri drogojn. Li Ŝiĝen, fama ĉina farmakologo de la 14-a jarcento, notis en sia farmakopeo

“Ben Caŭ Gang Mu” 65 receptojn por macerado de tonikaj vinoj. Ŝaŭŝing-vino estas ŝatata ankaŭ de akuŝintinoj. Ili kutime manĝas ovojn poĉitajn en varma vino. Antaŭ la printempa plugado oni trinkigas bovojn per la

vino por ke ili povu elteni la malvarmon de la rizkampo.

La vino estas ne-mankigebla por la ĉina gastronomio. Kuirante viandojn kaj fiŝojn oni uzas la vinon por forigi malagrablan odoron.



Parto de Ŝaŭŝing



“Filina Vino”

kribradon, mergadon, vaporumadon, fermentigadon kaj distiladon kaj envazigon de la farita vino. Tio multe mildigas la intencan de laboro kaj grandmezure altigas la produktokvanton. En 1949 la ĵara produktokvanto de la vino estis 1 522 tunoj, kaj nun jam atingis 26 000 tunojn.

Ŝaŭŝing-vino havas multe da specioj de karakterizaj gustoj, inter kiuj estas “Filina Vino”. Tie estis malnova moro. La familio, en kiu naskiĝis filino, devis fari kelkajn vazojn da vino post unu monato de ĝia naskiĝo kaj arte gravuris la vazojn, kaj poste konservi ilin en kelo aŭ enterigi ilin sub prospera bambuaro. Oni elprenis la vinon nur ĉe la edzinigo de la filino kaj regalis la gastojn per la vino. En la feŭda socio la “Filina Vino” estis uzata kiel tributo al imperiestroj.

La teknologio de la vinfarado estas plibonigata tagon post tago. La tradicia produkta metodo estis ne tre scienca: direkti produktadon per rigardo, flaro kaj gustu-

mo de metimastroj, kaj ankaŭ la produktiloj estis kompare postgintaj. Sed nun oni faras per maŝinoj, strikte laŭ la nova teknologio kaj kvalitnормoj, grenajn

Ŝaŭŝing-vino estas fama ne nur enlande, sed ankaŭ internacie. Ĝi akiris oran medalon en la ekspozicio okazinta en Nankino en 1910 kaj unuaklasan premion en la Universala Foiro de Panamo en 1915. En 1952 ĝi estis honorita kiel unu el la ok plej bonaj ĉinaj vinoj en la Unua Kunveno pri Taksado de la Ĉinaj Vinoj. Depost 1962 ĝi plurfoje akiris orajn medalojn de la ŝtato.

Unu el la multaj drinkejoj en Ŝaŭŝing



KOREKTO

Erara estas la prezo de la “Historio de la Lingvo Esperanto” donita en la recenzo sur p. 19 de n-ro 3 de E.P.Ĉ. Anstataŭ 5.50 gld. la libro kostas 18.00 gld.

Bazo de astronomia observado en suda Ĉinio

ANTAŬ ses jaroj mi laboris en la Junnan-a Observatorio, kiu antaŭe estis filio de la Ziĝinŝan-a Observatorio en Nankino, la plej granda astronomia stablo de Ĉinio. Ĝi fondiĝis antaŭ pli ol 30 jaroj, sed la grand-skala fundamenta konstruado komenciĝis nur antaŭ ses jaroj. Antaŭ nelonge mi veturis al la provinco Junnan pro ofico kaj kiam mi atingis la provincan ĉefurbon Kunming, mi tuj rapidis al la sopirata loko.


La Junnan-a Observatorio staras sur la Fenikso-monto en la

orienta antaŭurbo de Kunming. Kiam la aŭto veturis el la urbo kaj trans malkrutan deklivon, kelkaj eksterordinaraj konstruaĵoj kun kupoloj tuj frapis miajn okulojn.

La aŭto haltis antaŭ la ĉefdomo. Elirinte el la aŭto, mi tuj renkontis mian amikon. Kun ĝojo li premis mian manon, kaj diris fervore: “Ĉu vi povas rekoni la lokon?” Tie mi laboris tri jarojn, kaj tie ĉiuj herboj kaj arboj estis bone konataj por mi, sed nun ili estis iom fremdaj al mi. La antaŭaj loĝdomoj kaj portem-

paj observejoj ĉiuj estas ŝirmitaj de novaj konstruaĵoj kaj arbejoj. Dum la ses jaroj oni finis konstruon kun plankareo de pli ol 30 miloj da kvadratmetroj. Ĉirkaŭ la ĉefdomo staras ses domoj por eksperimentado, 12 observejoj kaj aliaj akcesoraj konstruaĵoj. Kiel brilaj perloj, la konstruaĵoj multe ĉarmigis la monton.

La sun-fizika sekcio staras sur la okcidenta monteto, tial la monteto ricevis la nomon “Sun-monto”. Impone aspektas la domo por eksperimentado, domo de



La Junnan-a Astronomia Observatorio

patrola helioskopo kaj domo de preciza helioskopo. La sudorienta monteto estas "Radio-monto". Tie oni instalas kelkajn radio-teleskopojn. La astro-mezura kaj astro-mekanika sekcioj okupas la nordorientan monteton. Plej norde de la observatorio estas konstruaĵo kun la plej granda kupolo. Sub la kupolo kuŝas optika teleskopo kun unu-metra kalibro importita, la plej granda el la ĉinaj astro-teleskopoj. Mia amiko manipulas la komputeron de la teleskopo. Racia estas la dispozicio de la observejoj de la observatorio. Ĝi jam fariĝis ĝenerala observatorio kun sekcioj stelofizika, sun-fizika, astro-mekanika, astro-mezura kaj radio-astronomia, ĉefe por esplori astrofizikon. Ĝi estas bazo de la astronomiaj observado kaj esplorado en suda Ĉinio.

Grandaj observatorioj, kiel la Pekina Observatorio, Ziĝinŝan-a Observatorio de Nankino kaj Ŝanhaja Observatorio, ĉiuj koncentriĝis en apudmara regiono de orienta Ĉinio kaj situas norde de la norda latitudo 31°. Tamen la Junnan-a Observatorio kuŝas ĉe la malalta latitudo de la Sudokcidento de Ĉinio. Tio plibonigis la dispozicion de la ĉinaj grandaj observatorioj. Tie la ĉefaj eksperimentejoj kaj observejoj ĉiuj staras sur la altebenaĵo de pli ol du mil metroj super la marnivelo. La situo estas alta, tial travidebleco de la aero estas granda kaj la astronomia vidado estas bona, kio estas tre taŭga por astronomia observado. Ĉi tie la temperaturo kaj humideco ŝanĝiĝas malmulte dum tuta jaro, sekve ili ne influas la precizecon de observado. Kaj cetere tie la sunlumado estas longa kaj multaj estas la observeblaj serenaj tagoj kaj noktoj. Ĝenerale tie estas ĉ. 200 serenaj noktoj. En ĉiu jaro ĉ. 310-320

tagoj estas taŭgaj por observi makulojn kaj kromosferon de la suno. Ĉio ĉi donas favorajn kondiĉojn al la Junnan-a Observatorio por fari astronomian observadon de sudokcidenta altebenaĵo de Ĉinio.

Mi alvenis al duetaĝa domo, la astro-mezura sekcio, kie mi laboris antaŭe. Sur ĝia unua etaĝo estas horloĝa ĉambro. En la ĉambro kun konstanta temperaturo laboras unu rubidia horloĝo kaj grupo da kvarcaj horloĝoj. Tiu rubidia horloĝo estas tiel preciza, ke ĝia ekarto estas nur unu sekundo dum 300 jaroj. La horloĝoj montras precizan tempon al ĉiuj observejoj. Norde de la domo staras du observejoj en la sama vico. En unu el ili oni instalas II-tipan fotoelektran astrolabon produktitan de nia lando por mezuri tempon; la alia estas observejo de meridiana instrumento. Du mezaĝaj teknikistoj kun junuloj respektive manipulas la du instrumentojn. Ili akiris nemalmultajn sukcesojn en la pasintaj jaroj. La teknikistoj manipulantaj la astrolabon partoprenis en la laboro de preciza mezurado de universala tempo. En serena nokto ili do observas la astrojn per la teleskopo. Dum kelkaj sinsekvaj jaroj la rezulto akirita de ili fariĝis pli kaj pli preciza, kaj fine atingis avangardan nivelon en nia lando. Ili kaj kunlaborantoj de la Ŝanhaja Observatorio k.a. ricevis la unuan premion de la ŝtato pro sia scienca kaj teknika esplorado.

La Junnan-a Observatorio akiris grandan sukceson en observado de la sunaj makuloj. Tie troviĝas specialistoj kaj bildigantoj de la suno. Ili rapide kaj precize desegnas la sunajn makulojn kaj akumulis kelkmil bildojn de la makuloj dum pli ol 20 jaroj. Tiuj bildoj jam fariĝis valoregaj

materialoj por esplori la aktivadon de la suno kaj la rilaton inter la suno kaj la tero kaj altiris atenton de la internacia astronomia rondo.



En la lasta tagdeko de novembro, 1983, pli ol 40 astronomoj el 12 landoj kaj pli ol 60 sciencistoj de sun-fizika esplorado partoprenis en la Internacia Simpozio pri Sun-fizika Esplorado en la Junnan-a Observatorio. Tiu estas ne nur la plej grandskala astronomia kunveno okazinta en Ĉinio, sed ankaŭ solena kunveno en la tuta mondo. La kunvenantoj opiniis, ke la sukcesoj de esploro pri la suno publikigitaj de la ĉinaj astronomoj jam eniris en la unuan vicon de la avangarda nivelo en la mondo. Estas karakteriza la esplorado de la Junnan-a Observatorio pri la antikva ĉina okulmezuro de sunaj makuloj kaj estas atentata de diverslandaj astronomoj. Antaŭ du mil jaroj ĉinoj jam trovis makulojn de la suno. Antikva libro verkita en la unua jarcento detale notis la grandan makulon trovitan en la 28-a jaro a. K., la daton de ĝia apero, ĝian formon, dimension kaj situon. La noto estis agnoskita de la mondo. Fremda erudiciulo multe emociiĝis pri la analizo kaj esploro faritaj de la astronomoj de la Junnan-a Observatorio pri la makuloj notitaj en la antikvaj libroj.


Dum kvar tagoj de mia vizito al la observatorio estis intima kaj nova por mi ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis. La plej granda ŝanĝo okazis ĉe junuloj, miaj antaŭaj kunlaborantoj. Ili maturiĝis, posedas pli multe da scioj kaj manipulas diversajn instrumentojn por observi la misteron de la universo. Ĉe la adiaŭo ni firme manpremis unu la alian. Mi deziras, ke ili multe kontribuu al la astronomia afero de la patrujo.

La Junnan-a Observatorio

Nove farita dek-
metra radio-teleskopo

Fruktodone laboras radio-
astronomiaj aparatoj.







La panoramo de la Jinnan-a Observatorio




Observatoriestro Ĉen Bjaŭ prelegas al fakuloj.




Dufrekvenca Doppler-ricevilo
o manipulata en astro-
neĥanika sekcio



Kometo West-1975n fotita
per astrogeomezura aŭto-
nata fotoaparato SBG



Sunaj makuloj fotitaj per refrakta teleskopo
de 13-centimetra kalibro




En la stelo-fizika sekcio estas teleskopo de unu-metra kalibro, la plej granda en Ĉinio.

Sciencistoj studas pri suna flagro.



Teleskopo ricevanta sun-radiojn



NOVAJ KOLORAJ INFANLIBROJ

eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo



MALATENTEMA VIRINO

Iun nokton malatentema virino vidis en sonĝo sian patrinon malsana. Vekiĝinte ŝi kun sia bebo en la brakoj tuj kuris al la vilaĝo de sia patrino. Tie ŝi trovis, ke ŝia patrino estas sana, sed ŝia bebo fariĝis vakskukurbo. Do kio okazis al ŝi?

88-Es-197P 182×206mm. 24 pĝ. £0,50 US\$0,95

KIEL KOVI

Kukolino baldaŭ demetos ovojn, sed ne scias kiel kovi ilin. Vidu, kiamaniere ŝi solvis la problemon.

88-Es-196P 182×170mm. 24 pĝ. £0,50 US\$0,95

ORA HAKILO


Knabo, revenante de kolektado de brulligno, faligis sian hakilon en riveron pro malatento. Iu maljunulo elakvigis por li oran hakilon. Li rifuzis kaj preferis sian feĉan. Tion aŭdinte lia avara frato volis havigi al si la oran hakilon. Ĉu li sukcesis?

88-Es-195P 175×256mm. 30 pĝ. £0,65 US\$1,30

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Perantoj de EPĈ

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca
Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O.
Kesto 313, Bejing, Ĉinio



260-TUNA ĈINA JADO

Grandega jado kun pezo de 260 760 kg., konata kiel jada reĝo estis eltrovita en la jaro 1960 en Ŝiŭĵan,

jada gubernio, Liaŭning-provinco. La jado en neregula formo, supre kun formo de duklina tegmento, havas kolorojn verdan, hel- kaj malhelverdan, ruĝan, flavan kaj nigran. Ĝi, tre taŭga por fari grandan pejzaĝan skulptaĵon, estas trezoro rara ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo.



La fondiĝo kaj pereco de la Suda Song-dinastio

de BA HONG

POST la pereco de la Norda Song-dinastio, Ĝaŭ Goŭ, pli juna frato de imperiestro Ĉinzong, surtroniĝis en 1127 kaj prenis Lin-an (la nuna Hangĝoŭ, ĉefurbo de Ĝeĝjang-provinco) kiel sian ĉefurbon. En la historio oni nomis lin Gaŭzong kaj lian regpotencon Suda Song-dinastio.

Gaŭzong neniam havis volon repreni la jam perditan teritorion kaj rezisti kontraŭ la atako de la armeo de Ĝin-regno, sed celis sole gardi sian kortegon. Tamen la vastaj popolamasoj subpremataj en norda Ĉinio organiziĝis unuj post aliaj por rezisti kontraŭ Ĝin-regno.

Aktive sin ĵetis en la rezistadon kontraŭ la armeo de Ĝin-regno ankaŭ iuj patriotaj generaloj de la Suda Song-dinastio, inter kiuj Jŭe Fej estis la plej fama.

NEVENKEBLA LA ARMEO DE JŬE FEJ

Jŭe Fej (1103-1142 p. K.) naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de Tangĵin-gubernio, Henan-provinco. Legendo diris, ke jam de sia infaneco li estis patriotisme edukata de sia patrino, kiu tatus sur lia dorso kvar ĉinajn ideografiaĵojn kun signifo

“lojale servi al la patrolando”. Jŭe Fej soldatiĝis en sia aĝo de 20 jaroj. Li brave batalis kaj faris multajn meritojn en milito. Kiam li aĝis pli ol 30 jarojn, li jam fariĝis grava generalo de la dinastio. Li edukis siajn subulojn, dirante, ke “la civilaj oficistoj ne strebu al mono kaj la generaloj ne timu morton”, la militistoj “ne malkonstruu domojn eĉ en mortiga frostoj kaj ne prirabu eĉ en malsatego”. Antaŭ ĉiu batalo ĉirkaŭaj popolanoj memvole transportis proviantojn al liaj trupoj. En la dekkelkaj jaroj post la fondiĝo de la Suda Song-dinastio, liaj trupoj gravege batis la malamikojn, ke la lastaj terure timiĝis eĉ je aŭdo pri ilia alveno. Ankaŭ liaj malamikoj vole-nevole admiris, ke lia armeo estas nevenkebla.

La venko de la armeo de Jŭe Fej skuis la tutan landon. La popolanoj en la loko okupata de la armeo de Ĝin-regno organiziĝis en rezistajn trupojn, tenante la flagon de Jŭe Fej kaj atendis alvenon de la armeo de la dinastio por kune ataki la armeon de Ĝin-regno kaj repreni la perditan teritorion.

Kiam la armeo de Jŭe Fej brave batalis kontraŭ la malamikoj kaj donis al ili pezan baton, la kortego de la Suda Song-dinas-

tio kaŝe faris serion da intrigoj por nuligi la venkon.

NACIPERFIDULO ĈIN GUJ

Ĉin Guj, ĉefministro de la Suda Song-dinastio, estis spiono de Ĝin-regno. Li kaj imperiestro Gaŭzong jam delonge komplotis por peti paciĝon de Ĝin-regno. La kortego de Ĝin-regno sciigis Ĉin Guj pere de sia sekreta sendito: “Nepre mortigu Jŭe Fej por paciĝi!” Obeante la fiintenco de la malamikoj Gaŭzong kaj Ĉin Guj en la daŭro de unu tago sendis 12 urĝajn ordonojn, ke Jŭe Fej tuj retiru sian armeon. Informiĝinte pri tio, soldatoj kaj popolanoj baris la vojon al Jŭe Fej kaj ploregis por restigi lin. Li tamen opiniis, ke la imperiestra ordono estas nemalobeebla. En indigno kaj domaĝo li diris: “La dekjara venko detruigis hodiaŭ!”

Reveninte al la ĉefurbo Jŭe Fej estis senigita je komandrajto, kaj kalumniita kiel perfidulo kaj enkarcerigita. Ĉin Guj ordonis siajn favoratojn torturi Jŭe Fej, por ke li kulpigu sin pri perfida krimo. Jŭe Fej demetis sian supran veston kaj nudigis la dorson surhavantan la ĉinajn ideografiaĵojn. Ne akirinte ian ajn atestaĵon pri perfidado de Jŭe Fej, Ĉin Guj sekrete ekzekutis lin pro



Jü Fej



Ŭen Tjanŝjang

falsa kulpigo. Tiam Jü Fej estis nur 39-jara. Por rememori tiun patriotan generalon posteuloj konstruis por li tombon kaj templojn en Hangôu, Tangjin kaj aliaj lokoj kaj muldis genuantajn ferajn figurojn de Ĉin Guj kaj liaj kunkrimuloj, kiuj intrige mortigis Jü Fej, kaj metis ilin antaŭ liaj tombo kaj temploj. Tiuj ĉefkrimuloj estas eterne ri-proĉataj de la popolo.

PEREO DE ĜIN-REGNO

Kiam la armeo de Ĝin-regno agresis foje-refoje la Suda Song-dinastion kaj prirabis ĝian popo-

lon, post la dorso de Ĝin-regno leviĝis pli potenca mongola nacieco. La mongoloj plurfoje venkis Ĝin-regnon kaj la lasta devigite translokis sian ĉefurbon de Janĝing (la nuna Pekino) al Bjanĝing (la nuna Kajfeng).

En 1232 p. K., la mongoloj ekstermis la elitajn armeojn de Ĝin-regno ĉe la monto Sanfeng (en la nuna Juŝjan-gubernio de Henan-provinco) kaj baldaŭ sieĝis ĝian ĉefurbon. Nur tiam la regantoj de Ĝin-regno volis alianciĝi kun la Suda Song-dinastio por rezisti kontraŭ la mongoloj. Sed tiam la Suda Song-dinastio

kaj la mongoloj havis interkonsenton por pereigi Ĝin-regnon.

En la sekvanta jaro la aliancigitaj armeoj de la mongoloj kaj la Suda Song-dinastio kune sieĝis Cajĝou (la nuna Ĵunan-gubernio de Henan-provinco) kaj pereigis Ĝin-regnon en 1234 p. K.

PEREO DE LA SUDA SONG-DINASTIO

Konkerinte Ĝin-regnon, la mongoloj komencis ataki la Suda Song-dinastion. En la bataloj ili renkontis bravan reziston de siaj rivaloj. En 1259 p. K. ĉe

Heĝoŭ (la nuna Heĉŭan-gubernio de Siĉŭan-provinco) la mongolan ĉefon Mongo Ĥano trafis kanono de la armeo de la dinastio. Pro la morto de sia estro la mongoloj retiriĝis. En 1267 p. K. la mongola armeo invadis suden kaj sieĝis Ŝjangjang (en la nuna Hubej-provinco). La garnizonanta armeo de la Suda Song-dinastio obstine defendis la urbon ses jarojn sen ekstera helpo kaj perdis ĝin en 1273 p. K. La mongoloj fondis Jŭan-dinastion en 1271 p. K. La armeo de Jŭan-dinastio moviĝis orienten laŭ Jangzi-rivero, konkeris la ĉefurbon Lin-an. Imperiestro Gongdi kapitulacis. Sed liaj korteganoj Ŭen Tjanŝjang, Lu Ŝiŭfu kaj aliaj daŭrigis la rezistadon kaj sinsekve surtronigis du princojn.

Ŭen Tjanŝjang kaj lia armeo faris firmajn batalojn kaj fine estis venkitaj, Kaj Ŭen estis kaptita. Generaloj de Jŭan-dinastio ĉiamaniere klopodis kapitulacigi lin. Tamen Ŭen respondis per poemo, kies lastaj versoj legiĝas jene: "Ja kiu iam povis savi sin de l' fato morti? Fidela koro mia brilu en la historio." Ŭen estis eskortita al Dadu (la nuna Pekino), la ĉefurbo de Jŭan-dinastio, tie li firme rifuzis kapitulacion, spite de ĉia minaco kaj allogo de la imperiestro de Jŭan-dinastio, kaj ĉiam tenis sin fidele al Song-dinastio. Li estis mortigita en 1283, en la aĝo de 47 jaroj. Li, same kiel Jŭe Fej, fariĝis modelo de patriotisma eduko por la posteuloj.

En 1279 la armeo de Jŭan-dinastio konkeris Jaŝan (en la suda parto de la nuna Gŭangdong-provinco), Lu Ŝiŭfu sin ĵetis en maron, dorsportante la malgrandan imperiestron Ŭejŭang. Tiel pereis la Suda Song-dinastio kaj Ĉinio estis reunuigita de Jŭan-dinastio.

Ceramikaj kaj muzikiloj de antikva

EN la Muzeo de la Imperiestra Palaco, Pekino, estas montrita porcelana muzikilo *ŝjaŭ* (vertikala fluto), farita en Dehŭa-gubernio, Fuĝjan-provinco en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). Ĝi estas neĝblanka, brila kaj rara. La bonkvalita porcelana *ŝjaŭ* sonas pli bele ol la bambua.

La muzikiloj plej frue trovitaj en Ĉinio estas osta kaj ceramika fajfiloj. Ili estis elterigitaj en la neolitika ruino Hemudu en la gubernio Jujaŭ de Ĝeĝjang-provinco. La ceramika fajfilo, uzita kiel muzika instrumento, jam havas historion de 7 000 jaroj. Poste la ceramika fajfilo evoluis en ovalan blovinstrumenton kun unu aŭ pluraj truetoj. En Ŝang-dinastio (16 jc. — 11 jc. a. K.) ĝi jam havis kvin truetojn kaj povis eligi dek unu sonojn.


En la antikva Ĉinio troviĝis alia ceramikaĵo nomata *foŭ* simila al urno, kaj en la komenco ĝi servis kiel vinujo. En la periodoj "Printempo kaj Aŭtuno" kaj "Militantaj Regnoj" (770 — 221 a. K.) oni uzis ĝin kiel frapinstrumenton. Pri tiu muzikilo estas jena historioto. En la jaro 279 a. K. la reĝo de Ĉin-regno sendis aranĝi rendevuon kun la reĝo de Ĝaŭ-regno ĉe Mjanĉi (en la nuna Henan-provinco), pretekste por akceli la amikan rilaton inter la du regnoj, fakte por minaci la reĝon de Ĝaŭ-regno. La lasta havis nenian alian elekton ol iri al la

rendevuo kun sia ministro Lin Ŝjangĵu, kaj samtempe li postenigis grandan nombron da armeanoj komandataj de generalo Ljan Po ĉe la landlimo, por sin gardi kontraŭ eventualaĵo. En la renkontiĝo la reĝo de Ĉin-regno ŝajnis sin ebria, dirante: "Mi aŭdis, ke via moŝto lerte ludas la muzikilon *se* (antikva korda muzikilo de Ĉinio). En la hodiaŭa solena renkontiĝo mi petas vin ludi ĝin por nin plezurigi." La reĝo de Ĝaŭ-regno ne kuraĝis rifuzi tion kaj vole-nevole ludis peccon da muzikaĵo. La reĝo de Ĉin-regno ordonis al sia historiografo noti la okazaĵon, ke la reĝo de Ĉin-regno ordonis al la reĝo de Ĝaŭ-regno ludi *se*, kaj ties daton. Tio evidente estis grandega malhonoro por Ĝaŭ-regno. Por defendi la dignon de Ĝaŭ-regno Lin Ŝjangĵu alpaŝis al la reĝo de Ĉin-regno, dirante: "La reĝo de Ĝaŭ-regno aŭdis, ke via reĝa moŝto lerte ludas *foŭ*. En la hodiaŭa solena renkontiĝo li petas vin frapi ĝin por plezurigi la ĉeestantojn." La reĝo de Ĉin-regno rifuzis tion, kaj Lin serioze diris: "Se vi ne faros tion, mi ŝprucigos mian kol-sangon sur vin en la distanco de malpli ol kvin paŝoj." La reĝo de Ĉin-regno vole-nevole frapis *foŭ* kelkfoje. Lin ankaŭ ordonis al Ĝaŭ-regna historiografo noti la okazaĵon, ke la reĝo de Ĉin-regno frapis *foŭ* por la reĝo de Ĝaŭ-regno, kaj la daton.

porcelanaj Ĉinio

En Tang-dinastio (618 — 907 p. K.) furoris ludo de la muzikilo *oǔ* (te-taso). En la ĉina historio estis rakonto: Gǔo Daǔjūan, muzikisto de Tang-dinastio, vicigis 12 te-tasojn, verŝis en ilin malsamajn kvantojn da akvo, lerte frapis ilin kaj ludis belan muzikaĵon.

En la periodo de la Kvin Dinastioj (907 — 960 p. K.) Ĉaj-bakejo jam produktis bonkvalitajn porcelanaĵojn per progressa metiarto. Frapate, ili eligis sonorajn sonojn. Pro tio oni ŝatis preni tian porcelanaĵon kiel frapinstrumenton. Poste artistoj de la fama porcelana urbo Ĝingdeĝen faris bovlo-frapinstrumenton, kies plej alta voĉo estis produk-




Nigra porcelana talia tamburo kun koloraj makuloj (59 centimetrojn longa)

tita de pokaletoj kaj kies plej malalta voĉo — de granda bovlo. Frapante ilin per du bambubastonetoj oni povis ludi diversajn muzikaĵojn kun malsamaj melodioj.

En la Muzeo de la Imperiestra Palaco konserviĝas nigra porcelana talia tamburo de Tang-dinastio kun koloraj desegnoj. Ĝiaj

du ekstremoj estas rondaj kaj dikaj, kaj la mezo maldika. Se oni tegas ĝiajn du bazajn flankojn per ledpecoj, oni povas ĝin frapi por ludi muzikaĵon. Ĝi havas longecon de 59 cm. kaj konsistas el ok kunigitaj pecoj. Ĝi estas valora materialo por studi la historion de la porcelana teknologio kaj muziko de Ĉinio.

NI PETAS PARDONON DE S-ROJ KENNETH G. LINTON KAJ ANDRE RIBOT



Jen estas foto de s-ro Kenneth G. Linton, nia peranto en Aŭstralio. Pro neglektemo ni erare metis sub lia foto la nomon de nia franca peranto s-ro Andre Ribot en la rubriko «Niaj Perantoj», n-ro 3 ĉijare. Ni petas, pro tiu misfaro, pardonon de s-roj Kenneth G. Linton kaj Andre Ribot kaj niaj legantoj. Ni reaperigas la foton por esprimi nian sinceran penton kaj koran dankon al s-roj Kenneth G. Linton kaj A. Ribot pro ilia fruktodona laboro por nia gazeto.

La Red. de EPC

Monumento de amikeco en la koro

NUN estas flora sezono en Pekino. Mi rememoris la amikojn en malproksimaj landoj, la senvelkajn florojn de amikeco spertintajn ŝtormojn, kaj ankaŭ la tagojn pasigitajn en Svisio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, kiam mi kaj la Ŝanhaja Ensemblo vizitis tiujn landojn.

“KIEL NI BEZONAS LA AMIKECON DE LA ĈINA POPOLO”

Ni flugis 18 horojn en la serena ĉielo kaj atingis nian unuan

etapon Svisio, kiu portas la nomon “ĝardeno de Eŭropo”.

Ĝus kiam ni atingis Bernon, ni aŭdis varmajn salutojn de svisaj amikoj. Ili diris: “Antaŭ longe niaj gazetaro kaj radio-stacio faris raporton pri via vizito. Ni malpacience atendis vian alvenon! . . .”

Efektive, la unua prezentado en Berno ĝuigis al ni la amikan kaj varman afablecon de la svisa popolo al Ĉinio. Ĉiu programero

rikoltis tondran aplaŭdadon kaj la ĉinaj aktoroj devis plurfoje riverenci al la spektantaro. La tempo de prezentado plilongiĝis duonhoron. Svisa amiko diris: “Ni svisoj estas psike internaj kaj malofte aplaŭdas al aktoroj. Sed viaj dancoj ‘Flugado en la Ĉielo’ kaj ‘Spadado’ estas graciaj kiel lirika poemo. Kaj viaj naciaj muzikaĵoj tute ravis nin.” Alia diris, ke en la antikva, gracia ĉina arto ili vidis la longan historion kaj brilan kulturon de la ĉina nacio.

La Ŝanhaja Ensemblo kaj svisaj amikoj en Zuriko



En Zuriko ni faris demonstra-
don pri ĉinaj naciaj muzikiloj laŭ
la peto de urbanoj kaj ĵurnalistaj
rondoj. Niaj aktoroj unue ludis
diversspecajn muzikilojn kaj poste
konigis iliajn karakterizaĵojn
kaj disvolviĝon. Multaj svisaj
muzikistoj kaj muzik-amatoroj
provludis la muzikilojn admirante
iliajn riĉajn nuancojn en es-
primpovo. Iu zurika ĵurnalista
miris: “La muzikilojn aperintajn
ĉe ni en Mez-epoko vi jam havis
antaŭ la Kristnasko. Kiel longan
historion Ĉinio havas!”

La svisaj amikoj admiras la
ĉinan kulturon kun longa histo-
rio, kaj alte taksas la amikecon
inter la du popoloj. Kien ni venis,
tie ni renkontis varmajn salutojn.
En Baselo iu sviso diris al ni:
“Kiel ni bezonas la amikecon de
la ĉina popolo!” Viceprezidanto
de la Svisa-Ĉina Amikeca Asocio
diris al ni, ke ili elektis junulon
kiel viceprezidanton, esperante ke
la svisa-ĉina amikeco daŭros de
generacio al generacio.

MONUMENTO DE AMIKECO EN LA KORO

Ni venis al Varsovio kunportante
la amikecon de la ĉina popolo.

La biletoj estis elĉerpitaj jam
antaŭ nia prezentado. Fine la teatro
vendis biletojn sen sidloko por
kontentigi urbanojn. Dum prezenta-
do la tuta teatro, eĉ la koridoroj kaj
peronoj, estis plenplenaĵoj de
rigardantoj. Sed ekster la teatro
ankoraŭ longa vico de homoj atendis
biletojn. Inter la rigardantoj estis
knabino paralizita je la gamboj. Ŝi
venis al la teatro en akompano de
la patro. Ŝi diris kun ĝojo: “Rigardi
prezentadon de ĉinaj artistoj estas
plezuro por la spirito.” Pola di-



S-ino Mira Zieminska Sygietyńska aranĝis vin-akcepton por la Ŝanhaja Ensemblo.

plomato diris: “Niaj ĉinaj amikoj
denove gastas ĉe ni post 18 jaroj.
Estas malfacile por mi vidi tiel
varman spektaklon. . .”

Inter la rigardantoj estis mal-
juna sinjorino, kiu estis aparte
ekscitita. Ŝi estas Mira Zieminska
Sygietyńska, 82-jara estro de la
pola Ŝtata Ensemblo “Mazowsze”.
Ŝi diris al ni: “Kiel bone estas,
ke vi venas! Mi dufoje vizitis
Ĉinion kaj la amikeco de la ĉina
popolo gravuriĝis en mia koro!”

Post prezentado rigardantoj
suriris la scenejon por prezenti
al ni buketojn, donaci memori-
gaĵojn kaj peti nian surskribon
aŭ fotojn de la prezentado. La
tuta teatro estis plena de arda
tajdo de amikeco. Ankaŭ la mal-
juna estro Zieminska venis al la
postscenejo por gratuli la ĉinajn
artistojn. Brakumante la estron
de la Ŝanhaja Ensemblo, ŝi diris
kun larmoj en la okuloj: “Dum
18 jaroj mi ne vidis vin, mi ege

sopiris al vi. Nepre gastu ĉe nia
ensemblo.”

“Mazowsze”, honorita kiel
“floro de la orienta Eŭropo”,
vizitis Ĉinion en 1953 kaj 1960
kaj neforgeseble impresis ĉinajn
rigardantojn. La ensemblo prez-
entis por la ĉina popolo la polan
popolkanton “Kukolo”. Ĉi-
foje ĉina kantistino Fang Ĝifen
kantis por la pola popolo la kan-
ton, kio skuis la spektantojn.
Kiam ni venis al la sidejo de la
ensemblo, kie naskiĝis la “Kukolo”,
polaj artistoj ameme nomis
Fang “nia kukolo”. La estro de
la ensemblo Zieminska karme-
moris siajn vizitojn al Ĉinio kaj
diris: “Ni gravuriĝis sur ŝtonon
de nia ĝardeno la datojn de niaj
vizitoj al Ĉinio, por ke la floro
de amikeco ĉiam floru en nia
ĝardeno.” Ŝi kondukis nin en la
ĝardenon kaj ni ĉirkaŭstaris la
ŝtonon, sur kiu gravuriĝas “1953,
1960, Ĉinio”. Palpante la ŝtonon,
ni ĉiuj estis kortuŝitaj de ilia
profunda amikeco al Ĉinio.



Celĥaj rigardantoj gratulas la Šanhajan Ensemblon pro ĝia bela prezentado en Brno.

“ĈIAM EN NIA KORŬ”

Adiaŭinte Varsovion, ni atingis Pragon, la ĉefurbon de Ĉeĥoslovakio. Por akcepti la Šanhajan Ensemblon, la registaro kaj popolo de Ĉeĥoslovakio faris zorgajn preparojn.

Brno estas la dua granda urbo de Ĉeĥio. La tagordo permesis al ni fari tie prezentadon nur unu-

foje. La direktoro de la teatro kondukis ĉinajn aktorojn al la pordo: Ho, granda amaso da homoj atendas biletojn ĉe la pordo. Vidinte nin, unu el la atendantoj venis antaŭ nin kaj diris: “Kiam nia pantomima trupo iris al Ĉinio, ni jam kredis, ke baldaŭ venos ĉina artista trupo. Ekde tiam ni atendis kaj atendadis, kaj fine vidis vin!”

(Daŭrigo de p. 52)

La sekvantan matenon mi veturis al la dua murego, plej bone konservata, kiu longas pli ol 120 kilometrojn, kaj distancas 30 km. norde de la gubernia urbeto. Mi admiris la vidaĵon: la torenta Flava Rivero, la alte starantaj gardoturoj sur ĉeborda krutaĵo kaj murego. La konstruaĵoj kaj la naturaĵo kune formis mirindan ŝirmilon.

La Flava Rivero estas la dua granda rivero de Ĉinio, malpli granda nur ol Jangzi. De nealkuleblaj jaroj ĝi torentas, muĝas kaj per sia granda sino nutras la ĉinan nacion. Ĝi simbolas la nacian patrinon. Vidu, ĉu la Granda Muro ĉe la Flava Rivero

ne aspektas kiel fidela gardisto de la patrino?

Laŭ la rivero mi venis al Tjanĉjaŭ, la unua hidroelektrejo sur la meza parto de la rivero, konstruita en 1977. Somere la rapida fluo kunportis ĉiutage pli ol cent milionojn da tunoj da leŭso. Laŭ la komplikaj naturaj kondiĉoj oni projektis du-nivelan akvo-drenan kluzon kaj sablotralasan truon en la elektrejo. Dum la jaroj post sia ekfunkcigo la elektrejo kun kapacito de 128 000 kilovattoj eltenis la provon de granda akvopremo. Ĉiujare ĝi produktas pli ol 300 milionojn da kWh da elektro sufiĉajn por la ĉirkaŭaj gubernioj. Kampanoj ĝoje diris, ke elektro ebligis al ili turni sekajn kam-

Gesinjoroj Bovlek rigardis nian prezentadon. Tuj post sia eniro en la teatron ili prezentis bukedon al la estro de la Šanhaja Ensemblo kaj diris en emociiĝo: “Ni instruis tri jarojn en la Šanhaja Konservatorio. Kiel bonaj ĉinaj kamaradoj! Antaŭ kelkaj tagoj ni informiĝis pri via alveno, kaj ni faris grandan klopodon por akiri la biletojn. Estas granda ĝojo por ni vidi vin!” Li zorgeme demandis: “Kiel fartas estro He Luting (fama ĉina muzikisto, nun estro de la Šanhaja Konservatorio)? Kiel fartas miaj lernantoj?” Li montris la insignon de la konservatorio, kiun li portis siatempe, kaj diris, ke tio estas por li eterna memorigaĵo. Multaj el la rigardantoj suriris la scenejon, kaj iu maljuna el ili kriis en la ĉina lingvo: “Vivu la amikeco inter la ĉeĥoslovaka kaj ĉina popoloj!” Tiam oni prezentis bukedojn, manpremis, salutis, fotis kaj interŝanĝis memorigaĵojn. La tuta teatro ekbolis de pasio de la amikeco.

pojn en rizkampojn, kio garantias al ili riĉan rikolton eĉ en sekaj aŭ pluvegaj jaroj. Elektra lampo lumigas ĉiun domon, elektro helpas ĉiun vilaĝan muelejon. La vivo fariĝis multe pli oportuna.

Starante sur la loko, kie intermiksiĝis la antikveco kaj la moderneco, mi sentas mian koron ondanta kiel la Flava Rivero. Sur la malproksima fono de la flava riverakvo kaj flava kamparo konturiĝis la antikva Granda Muro, la simbolo de la forto de la ĉina nacio kaj ĝia nefleksebla karaktero. Mi respektoplene levigis la fotoaparaton kaj fotis tion por registri mian profundan respekton al niaj prapatroj kaj nia nacio.

第六课

Sesa Leciono

Ĉu vi estas okupita?

I. vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
忙 (adjektivo)	máng	(esti) okupita
不 (adverbo)	bù	ne
太 (adverbo) ¹	tài	tre, tro
呢 (partikulo) ²	ne	moda partikulo
很 (adverbo) ³	hěn	tre
白天 (nomo)	báitiān	tago
晚上 (nomo)	wǎnshàng	vespero
上 (verbo)	shàng	viziti
夜校 (nomo)	yèxiào	vesperlernejo
学习 (verbo)	xuéxí	lerni
外语 (nomo)	wàiyǔ	fremdlingvo

2. teksto

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

林红：“你忙⁴吗？”

Lín Hóng: “Nǐ máng ma?”

vi okupita ĉu

Lin Hong: “Ĉu vi estas okupita?”

安娜：“我不太忙。你呢⁵？”

Ānnà: “Wǒ bù tài máng. Nǐ ne?”

mi ne tre okupita vi

Anna: “Mi estas ne tre okupita. Kaj vi?”

林红：“我很忙。我白天工作，

Lín Hóng: “Wǒ hěn máng. Wǒ báitiān gōngzuò,

晚上上夜校。”

wǎnshàng shàng yèxiào.”


laŭvorta traduko	mi tre okupita mi tago labori vespero viziti vesperlernejo
Esp-a traduko	Lin Hong: “Mi estas tre okupita. Mi laboras tage kaj vizitas vesperlernejon vespere.”
han-lingvo	安娜: “你学习 ⁶ 什么?”
HFA	Ānnà: “Nǐ xuéxí shénme?”
laŭvorta traduko	vi lerni kio
Esp-a traduko	Anna: “Kion vi lernas?”
han-lingvo	林红: “我学习 外语。”
HFA	Lín Hóng: “Wǒ xuéxí Wàiyǔ.”
laŭvorta traduko	mi lerni fremdlingvo
Esp-a traduko	Lin Hong: “Mi lernas fremdlingvon.”

Klarigoj:

1. 太 (adverbo) ĝenerale determinas adjektivon. Oni uzas ĝin por esprimi komparacion kun la senco de “en alta grado” aŭ de “pli ol sufiĉe, pli ol necese, pli ol ĝustamezure”. Ĝia unua senco aludas laŭdon kaj la dua aludas neadon aŭ malaprobbon. Ordinara vortoaranĝo estas “太 + adjektivo” aŭ “不太 + adjektivo”. “不太” signifas “ne tre”.
2. 呢 (partikulo) estas montranta modo de frazo. Ĉi tie ĝi troviĝas ĉe la frazino por fari demandon.
3. 很 (adverbo) signifas “tre”. Ĝi ofte aperas antaŭ adjektivo aŭ verbo kiu prezentas spiritajn fenomenojn. Jen kutima esprimo “很 + adjektivo” aŭ “很 + psika verbo”. Antaŭ kaj post 很 oni povas aldoni “不”. La senco de “不很” estas “ne tre” kaj tiu de “很不” estas “tre ne”.
4. En han-lingvo sole adjektivo sen verbo povas funkcii kiel predikato. Tia predikato ĉefe eksplikas kvaliton aŭ staton de subjekto. Ekzemple la frazo “我很忙”, laŭvorte 我 (mi) estas subjekto, 很 (tre) adverbo kaj 忙 (okupita) adjektivo kaj en la frazo ĝi estas predikato.
5. “你呢?” (Kaj vi?): En la kunteksto tiu frazo samsignifas kun “你忙吗?” (Ĉu vi estas okupita?) En han-lingvo, same kiel en Esperanto, oni ofte ellasas iujn frazelementojn, kiujn la interparolo aŭ la kunteksto ebligas ne esprimi.
6. “你学习什么?” (Kion vi lernas?): En tiu frazo la vorto 学习 (lerni) estas verbo funkcianta kiel predikato kaj 什么 (kio-n) estas pronomo — objekto. En han-lingvo multaj verboj povas jen havi jen ne havi objekton. Oni povas diri “我学习” (laŭvorte: mi lernas) kaj ankaŭ “我学习外语” (mi lernas fremdlingvon).

Kvar specoj de skribiloj de Ĉinio

de MEJ ĜI



LA kvar specoj de skribiloj origine konsistis el kvar objektoj ĝenerale uzataj de ĉinoj dum skribado kaj pentrado, nome peniko, tuĉo, papero kaj tuĉfrota ŝtonplato. Poste Ŝjŭan-papero, Huj-tuĉo, Hu-peniko kaj Ŝe-ŝtonplato fariĝis la plej superaj per sia kvalito kaj la nunaj kvar specoj de skribiloj jam fariĝis nomo de tiuj produktaĵoj. La skribilaro ne nur havas valoron en uzado, sed ankaŭ estas artaĵoj.

Ŝjŭan-papero estas farata en Ĝingŝjan-gubernio de Anhuj-provinco. En la antikveco Ĝingŝjan nomiĝis Ŝjŭanĝoŭ, tial la tiea papero ricevis la nomon. Ĝingŝjan havas historion de pli ol 1 500 jaroj en farado de Ŝjŭan-papero. Legendo diras, ke Kong Dan, disĉiplo de Caj Lun, la inventinto de papero de Ĉinio, deziris fari paperon taŭgan por pentri portreton de sia majstro kaj

verki lian biografion, sed li malsukcesis en pluraj provoj. Foje, li vidis ĉe monta rivereto falintan arbon pterocelto (*Pteroceltis tatarinowii*), kies ŝeloj jam putris, sed la fibroj estis tre blankaj, malgraŭ multjara vetermordado kaj ruado. Li trovis ĝin bonkvalita materialo por papero. Post dekjara klopodo li fine sukcesis fari Ŝjŭan-paperon el pterocelta ŝelo.


La farado de Ŝjŭan-papero konsistas el 18 procedoj kaj bezonas 300 tagojn. Bonkvalita Ŝjŭan-papero estas mola, fortika, sorbema, tineo-imuna kaj neputrema kaj surhavas nuboformajn vejnojn videblajn sub lumo. En la antikveco estis diro, ke “tuĉado povas lasi sur Ŝjŭan-paperon kvin kolor-intensecojn”. Dum la pasintaj pli ol mil jaroj, multaj altvaloraj ĉinaj pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj faritaj sur Ŝjŭan-papero, sendifekte konserviĝis.

Ĉinoj ŝatas Ŝjŭan-paperon ĝuste pro tio ke ili kutimas skribi kaj pentri per peniko. Sekve la peniko fariĝis nedisigebla disde tuĉo.


La penika bastoneto estas farita el bambuo kaj tufo ĉefe el haroj de kapro aŭ putoro. Hu-peniko estas preferata pro delikata farado kaj elektado de materialoj.

Hu-peniko estas speciala produktaĵo de la urbeto Ŝanlĵan de Ĝeĝjang-provinco. Ŝanlĵan antikve estis administrata de Huĝoŭ, tial la peniko ricevis la nomon. Estas multaj specoj de peniko. La granda peniko por skribado de grandaj ideografiaĵoj havas diametron de bovlo kaj la malgranda por desegnado maldikas kiel pinglo. Ilia farado konsistas el 72 procedoj. La kapraj haroj povas esti dividitaj en 19 klasojn, inter ili nur kvin estas taŭgaj por fari altklasajn penikojn. La labo-

Penikoj



Tuĉfrotaj ŝtonplatoj



Granda kuraĝigo

POR plibonigi nian revuon, ni sendis enketilojn al niaj legantoj kune kun la numero 12 de 1983. Tio havas signifon por antaŭenigi nian laboron kaj rice-

vis entuziasman subtenon de la vasta legantaro. Ĝis la fino de la lasta marto nin atingis ĉ. 400 enketiloj resenditaj el 35 landoj. Tiu nombro estis rekorda en la

lastaj jaroj. Ni kore dankas la fervorajn respondintojn. Kvankam nia revuo ankoraŭ havas multajn mankojn, tamen niaj legantoj rigardas ĝin kiel sian pro-

ristoj unue devas klasifiki kaj proporcie miksi la kaprajn harojn kaj harojn de putora vosto laŭ iliaj longecoj, koloroj kaj molecoj por fari malsamajn penikojn. Ĝenerale, peniko el kapraj haroj estas kompare mola, dum tiu el putoraj haroj estas malmola. La lasta procedo de la farado estas ordigo, nome forigi el la tufo malordajn harojn kaj doni al ĝi la formon de konuso. Tio postulas sufiĉe altan teknikon.

Tuĉo estas solida inko. Por uzi ĝin en skribado aŭ pentrado oni devas unue meti gutojn da akvo en la tuĉfrotan ŝtonplaton kaj poste cirkle froti la tuĉon en la akvo, ĝis la akvo fariĝas tuĉa likvo. Altklasa tuĉo ordinare estas farita el fulgo pinligna aŭ aleŭrit-olea, mosko, gumo kaj aliaj ĉ. dek materialoj. La plej frua faranto de Huj-tuĉo estis Ŝi Ĉaŭ en la komenco de la deka jarcento. Li kaj lia filo faris bonkvalitan Huj-tuĉon, prenante pinlignon de Anhuj-provinco kiel materialon.

Huj-tuĉo estis preferata de diverstempaj kaligrafoj kaj pentristoj. Ili admiris, ke "ĝi surpa-

pere similas lakon kaj konserviĝos eterne". Huj-tuĉo estas brila, arome odoranta, kaj cetere ankaŭ artaĵo.

La tuĉfrotita ŝtonplato havas longan historion kaj multajn specojn. La famaj Dŭan-ŝtonplato de Ĝuangdong-provinco, Ŝe-ŝtonplato de Anhuj-provinco, Ĉengni-ŝtonplato de Ŝanŝji-provinco kaj Taŭhe-ŝtonplato de Gansu-provinco estas la kvar plej superaj de tuĉfrotita ŝtonplato.

Ŝe-ŝtonplato estas farita en Ŝeŝjan-gubernio de Anhuj-provinco, kie abundas skista stratumo formita antaŭ miliardo da jaroj. Tia ŝtono estas tre taŭga por fari ŝtonplaton. Antaŭ 1 200 jaroj oni komencis fari Ŝe-ŝtonplatojn en tiu loko. La akvo en tia ŝtonplato malfacile vaporiĝas kaj la tuĉlikvo estas tre brila. Sur la fronta kaj dorsa flankoj de tia ŝtonplato la laboristoj emas fari gravuraĵojn pri montoj, riveroj, homoj, birdoj, bestoj, floroj, insektoj, fiŝoj kaj aliaj. Tiaj ŝtonplatoj, precipe altklasaj, jam fariĝis artaĵoj.

La kvar specoj de skribiloj estas ero de la ĉina antikva kul-

turo kaj enlande ĝuas altan takson. Ili vendiĝas ankaŭ en Japanio kaj sudorienta Azio kaj estas tre ŝatataj de la uzantoj.

Tuĉoj



pran. Tio estas granda kuraĝigo al ni. Ĉi-sube ni publikigas la unuajn tri artikolojn kaj bildojn, kiuj ricevis plej multajn aprobojn:

1. Esperanto: "Esperanto devas esti uzata en sciencoj kaj ĉiutaga vivo", "Pri la angla lingvo kaj lingva hegemonio" kaj "Pri la naturo de Esperanto".

2. Politiko: "Pri la nova konstitucio de Ĉinio" (ni prezentas nur la plej multe laŭditan el la tri tiuspecaj artikoloj).

3. Ekonomio: "Abelbredado en Ĉinio", "Sunenergiaj fornoj en Ĉinio", "Kiel Ĉinio ŝparis energion?" kaj "La celo kaj paŝoj de ĉina ekonomia disvolvo" (la lastaj du gajnis paralele la trian lokon).

4. Kulturo kaj edukado: "La ĉina antikva filozofio", "Naturparkoj de Ĉinio" kaj "Privataj lernejoj en Pekino".

5. Literaturo kaj arto: "Li Kuchan, majstro de ĉinstilaj pentraĵoj", "Libroendistino" kaj "Kvindek du fotoj".

6. Medicino, higieno kaj sporto: "Pri ĉinmedicina kuracado", "20 sanprotektaj ekzercoj" kaj "La ĉina hidroterapio".

7. Popola vivo: "Enketo pri amo kaj geedziĝo de junaj laboristoj", "Inter la argilaj figuroj de Qin-dinastio", "Ŝi kortuŝas gejunulojn" kaj "Ĝenerala nombro de la ĉina loĝantaro" (la unuaj du gajnis paralele la unuan lokon).

8. Historio, historiaj objektoj: "Epizodoj sude kaj norde de la Granda Muro", "Antikva ceramikado de Ĉinio" kaj "Sciencaj kaj kulturaj atingoj de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj".

9. Naciecoj: "Mongoloj kaj ĉevaloj" (ni prezentas nur la plej

multe laŭditan el la malmultaj tiuspecaj artikoloj).

10. Turismo, pejzaĝo kaj vojaĝo: "Kiel esperantistoj povus vojaĝi al Ĉinio?" "En akvoriĉa lando" kaj "En hejmloko de silko".

11. Internaciaj problemoj kaj amikeco: "Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de J. Haŝek", "Ĉinaj kuracistoj eksterlande" kaj "Novaj tendencoj de la monda loĝantaro".

12. La aliaj: "La skribolingvo de Ĉinio", "La administra divido de Ĉinio", "Tradiciaj festoj de Ĉinio" kaj "Rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante" (la lastaj du gajnis paralele la trian lokon).

13. Kovriloj: "Sani-a knabino" (n-ro 10), "En 110-metra vira barierkuro" (n-ro 12) kaj "La Ĉina Esperanto-Delegacio kaj prezidanto de UEA G. Maertens".

14. Unua kolora serio: "Feliĉaj infanoj" (n-ro 6), "En la 68-a Universala Kongreso" (n-ro 11) kaj "La tradicia foiro en Kashi" (n-ro 1).

15. Dua kolora serio: "Huaŝan-monto" (n-ro 11), "Pejzaĝoj ĉe Hengshan-monto" (n-ro 12) kaj "Cangyan-monto" (n-ro 3).

16. Tria kolora serio: "De la fonto ĝis Songnen-ebenaĵo" (n-ro 10), "En la akvoriĉa lando" (n-ro 3), "Hunan-aj brodaĵoj" (n-ro 9) kaj "De Jiamusi al Tongjiang" (n-ro 12) (la lastaj tri gajnis paralele la duan lokon) kaj "Kortegaj dancoj kaj muziko de Tang-dinastio" (n-ro 8).

17. Unua nigra-blanka serio: "Zhang Haidi" (n-ro 7), "Ĉinaj kuracistoj eksterlande" (n-ro 9) kaj "'Fabriko' de rizplantedoj" (n-ro 5).

18. Dua nigra-blanka serio: "Ĉina pentristo Li Kuchan" (n-ro 11), "Dum postlaboraj horoj" (n-ro 1) kaj "Plezuro de emeritaj laboristoj" (n-ro 7).

19. Fotoj faritaj de esp-istoj: "Sunplenaj aŭtunaj folioj" (n-ro 2), "En la Aŭstraj Alpoj" (n-ro 3) kaj "Melodio de la lumo" (n-ro 9).

20. Dorskovriloj: "Longviculo" (n-ro 2), "Esperantaj poŝtmarkoj" (n-ro 5), "Lago en matenkrepusko" (n-ro 6) kaj "Prospereco" (n-ro 9) (la lastaj du gajnis paralele la trian lokon).

Tiu enketado karakteriziĝas per la jeno: Unue, la balotintoj estas seriozaj kaj fervoraj, kaj iliaj elektitaj artikoloj kaj bildoj koncernis ĉiujn numerojn de 1983; due, preskaŭ ĉiuj artikoloj kaj bildoj aperintaj en 1983 ricevis aprobojn, kvankam ne same multajn, tamen tio diras al ni, ke la preferoj de la legantoj estas diversaj kaj ke la kvalito de la revuo leviĝis iom post iom dank' al la kuna klopodado de ni kaj la legantaro; kaj trie, la literaturaĵoj, nigraj-blankaj bildoj kaj dorskovriloj ricevis kompare malmultajn aprobojn, kio postulas, ke ni multe klopodu por ilin plibonigi.

Ni jam sendis al la respondintoj E-librojn, ĉinajn poŝtmarkojn, papertondaĵojn kaj paĝomarkilojn kiel donacon por esprimi nian koran dankon. Aliaj legantoj ne resendis al ni la enketilon, tamen ili antaŭe jam donis al ni siajn opiniojn kaj proponojn. Ĉi tie ni dankas ankaŭ ilin pro ilia varma prizorgo kaj subteno al nia laboro.

La Redakcio

Tri pasejoj sur la Leŭsa Altebenaĵo

de MEJ ĜI

KURIS nia trajno kaj preter-lasis la pentrindajn pejzaĝojn norde de la Granda Muro. Tuj kiam ĝi veturis en Ŝanŝi-provincon sude de la muro, en miajn okulojn saltis vidaĵoj de la Leŭsa Altebenaĵo. Ĝuste tie sidas la tri famaj pasejoj de la Granda Muro: Janmengŭan, Ning'ugŭan kaj Pjangŭan.

“JANMENGŬAN, LA PLEJ DANĜERA EL LA MULTAJ ĈINAJ PASEJOJ”


Janmengŭan situas sur la kru-tega Janmen-monto norde de Dajŝjan-gubernio. La pasejo imponas sur la monto, al kiu spiras nur unu antikva vojeto. His-

toria libro diras, ke ambaŭflanke de la pasejo la montpintoj estas tiel altaj, ke eĉ sovaĝansero ne povas transflugi krom preni la pasejon kiel trairejon. Pro tio la pasejo ricevis la nomon Janmengŭan, kiu ĉinlingve signifas “pasejon por sovaĝansero”. En la antikva tempo ĝi estis konata kiel “la plej danĝera el la multaj ĉinaj pasejoj” kaj fariĝis strategie grava loko.

La pasejo kun brika muro sur ŝtona bazo unu kilometron longa kaj pli ol ses metrojn alta estis konstruita en Tang-dinastio (618-907) kaj rekonstruita en Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi havas pordojn orientan, okciden-

tan kaj nordan. En horizontala ŝtontabulo inkrustita super la aperturo de la arka pordo gravuriĝis la nomo de la pasejo. Hodiaŭ ĉe la pasejo restas nur la pord-arkoj, paro da ŝtonaj leonoj, paro da ŝtonaj flagmastoj kaj kelkaj steleoj.

Pasis jaroj. Multe difektiĝis la antikva fortreso. Tamen la epizodoj okazintaj tie cirkulas tra Ĉinio de jarcentoj. En la jaro 980 la regno Ljaŭ fondita de norda nacimalplimulto ekspedis armeon el 100 000 soldatoj por invadi la pasejon. La armeo de Song-dinastio (960-1279) sub generalo Jang Je brave batalis kaj komplete ekstermis ilin. Tiel



Vilaĝo ĉe la Granda Muro

renomis la generalo kaj oni honoris lin per "Senrivala Jang". Poste pro eraro de la ĉefkomandanto en batalo, Jang Je implikiĝis en ĉirkaŭatako, grave vundiĝis. Kaptite de la malamikoj, li fastis kaj mortis. Liaj posteuloj daŭrigis lian aferon kaj faris grandajn meritojn en bataloj. En Ĉinio preskaŭ ĉiuj scias pri la generaloj de Jang-familio.

En mia infaneco la avino ofte rakontis al mi pri la generaloj de Jang-familio. Eble ĉar mi estis knabino, mi plej admiris generalinon Mu Guĵing, bonepinon de Jang Je. Ŝi estis bela kaj superis aliajn per sia luktarto. Ŝi ofte vestis sin per milita kostumo kaj iris batali kontraŭ la malamikoj. Iam ŝi eĉ frakasis 72 malamikajn formaciojn. Foje ŝi, kiel ĉefkomandanto, gvidis la armeon en la batalo kontraŭ la malamikoj kaj gajnis brilan venkon. Pro ŝia braveco en la batalo la malamikoj tuj falis en panikon je ekaŭdo de ŝia apero.

Krom Mu Guĵing, en Jang-familio troviĝis ankaŭ aliaj bravulinoj. Laŭdire la edzino de Jang Je komandis armeon por bati malamikojn eĉ en sia aĝo de pli ol 100 jaroj. Post kiam la viroj de tri generacioj de Jang-familio mortis en bataloj, 12 Jang-familiaj virinoj inkluzive de Mu Guĵing kune iris por helpi Song-dinastiajn trupojn ĉirkaŭitajn de la malamikoj, kaj gajnis triumfon. Ĉiuj rakontoj pri la generaloj de Jang-familio, escepte de tiuj pri Jang Je, baziĝis sur fikcio. Sed en mia infaneco la kortuŝaj rakontoj vekis ĉe mi diversajn fantaziajn pensojn pri Janmengŭan-pasejo. Hodiaŭ mi promenis sur la antikva batalejo, kiun mi longe sopiris vidi. Antaŭ la kripla pasejo mi



Hela kaj komforta kaverndomo apud la Granda Muro en Ŝanŝji

imagis rapide rajdantajn Jang-familiajn generalinojn blanke kirasitajn kaj eksentis fieron pro la ĉinaj virinoj.

NOVA FIZIONOMIO DE ANTIKVA PASEJO NING'UGŬAN

Nemalproksime de Janmengŭan staras impona turo Ĝingbjan (aŭ tambura turo), pli ol 40 metrojn alta, konstruita en Ming-dinastio. Ĝi estis la unua turo de Janmen por gardi la tri pasejojn. La turo havigas al homoj panoraman vidon al la ĉirkaŭaĵo. Mi aŭdis, ke sur la turo estis militkomandejo en antikveco. Kiam malamikoj alvenis, oni tuj tamburis sur la turo. Aŭdinte la alarmon tuj ekagis la militistoj ĉe la pasejoj Janmengŭan kaj

Ning'ugŭan kaj aliaj 18 orientaj kaj okcidentaj garnizonejoj.

Pli ol 100 km. okcidente de la tambura turo estas pasejo Ning'ugŭan. Post aŭtuna pluvo la montvojo kondukanta al Ning'u fariĝis pli malfacila. Mia rigardo direktiĝis eksteren tra la fenestro de la aŭto kaj ĉirkaŭprenis la ondiĝantajn montojn proksimajn kaj forajn. Sub la vojo estas nesondebla kapturna ravino.

Ning'ugŭan troviĝas meze de la aliaj du pasejoj. La tieaj trupoj povis helpi Janmengŭan en oriento kaj Pjangŭan en okcidento, se ili estis atakitaj. Ĝi efike defendis Ĉinion en ĝia nordo. Sed jam malaperis la malnova paseja urbeto. Ĉe ĝia ruino oni starigis la gubernian urbon Ning'u. Parto de la Granda

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



Muro en tiu loko jam perdis sian originalan imponecon. Sed antaŭe, en la montaro serpentas novaj fervoj kaj ŝoseoj.

Ning'u, ĉirkaŭita de montoj, antaŭe estis konata kiel izolita malriĉa loko. Tiam en la gubernio estis nur malebenaj vojetoj. Por trairi 30 km., aŭto bezonis eĉ tri aŭ kvar horojn. Somere monta torento ofte detruis kaj inundis vojojn kaj pro tio kontakto inter la vilaĝoj fariĝis malfacila. Estis malfacile por kampuloj viziti najbaran vilaĝon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la lokanoj konstruis en la montaro pontojn kaj vojojn kun totala longeco de pli ol 370 km. Nun en la gubernio estas facila ŝosea kaj fervoja trafiko. La konstruado de fervojo en tiu loko eble ne estis pli facila ol tiu de la Granda Muro. La pli-ol-40-kilometra sekcio de la fervojo en la gubernio devas trairi 13 tunelojn, el kiuj la plej granda longas 3.5 km. La gubernio havas du fervojajn staciojn ĉiutage en vigla laboro.

La trafika disvolviĝo en Ning'u strikte rilatas al la riĉa karbo. La provinco Ŝanŝji estas grava karbobazo de Ĉinio, kaj du trionoj de ĝiaj gubernioj havas sub si karbokampojn. Ning'u, gubernio kvankam malgranda,

havas 128 grandajn kaj malgrandajn karbominejojn. Ĝia karbo ne nur kontentigas la bezonon de la loko, sed ankaŭ transportiĝas diversloken. Iu loĝanto diris al mi, ke Ning'u ŝuldas sian prosperiĝon al karbo. Kun kreskanta bezono de karbotransportado salte multiĝis la aŭtoj de la gubernio. Nun multaj riĉiĝintaj kamparanoj jam aĉetis aŭtojn por okupi sin pri karbotransportado.

Mi ne bedaŭris, ke mi ne trovis en Ning'u ian miraklon postlasitan de niaj prapatroj, ĉar iliaj posteuloj hodiaŭ kreas ion multe pli grandan.

ĈE LA FLAVA RIVERO

Pjangŭan ĉe la Flava Rivero estas la lasta el la tri pasejoj. La pasejo estis instalita en Ming-dinastio, strategie grava loko gardata de pli ol 10 000 soldatoj.

Survoje de Ning'u al Pjangŭan, mi sate rigardis la originalajn pejzaĝojn de la Leŭsa Altebenaĵo. Sub la lazura firmamento ĉie regis flavo monotona kaj senlima. La densa, simpla koloro kondukis min kvazaŭ en mirindan mondon. Tiuj altaj leŭskoloraj montoj etendiĝis en kontinuo kaj abundis je interkruci-

ĝantaj valoj kaŭzitaj de torentoj. Ifoje antaŭ mi prezentiĝis vico kaj vico da novaj kaverndomoj, unuj super aliaj ĉe la monttalioj. La tero de la Leŭsa Altebenaĵo estas bonkvalita por kavernokonstruado. La kavernoj kun pordo kaj fenestroj servas kiel loĝejo, varmetaj en vintro kaj malvarmetaj en somero. Pro tio oni ŝatas ilin. Sed la nunaj estas multe pli belaj ol la malnovaj. La kaverndomoj el brikoj kaj ŝtonoj, kiujn mi vidis ĉe montpiedo aŭ sur montdeklivo, havas grandan korton kaj ebenan tegmenton. La gravuroj sur la lignaj pordoj kaj fenestroj de brilaj koloroj kaj en antikveca gusto plenas de densa vilaĝa etoso. Oni faris ankaŭ elegantajn kaverndomojn du- aŭ tri-etaĝajn laŭ la deklivo. Mi iris tien ĝuste en sezono de aŭtuna rikolto, kaj tiam en ĉiuj hejmoj sunumiĝis flavaj maizaj spadikoj sur la tegmento, kuŝiĝis grandaj kukurboj sur la fenestrobreto kaj pendis ruĝaj kapsikoj ĉe la pordo.

Tuj kiam mi atingis Pjangŭan-pasejon, mi aŭdis, ke proksime de la pasejo estas kvar muregoj konstruitaj en Ming-dinastio, kiujn oni povas rigardi Granda Muro sude de la Granda Muro.

(Daŭrigo sur p. 44)

TRI PASEJOJ EN ŜANŜJI-PROVINCO


Fotoj de ĈJU ŬEJBO

La unua turo de Janmengŭan



Parto de la Granda Muro en Ŝanŝji-provinco






Fervojo kondukanta
al Ning'ugüan-pasejo



Ruino de la Granda Mu-
ro apud la tri pasejoj

Malgranda hidroelektra
jo ĉe Ning'ugüan-pasejo




Pjanguan-pasejo



Janmenguan-pasejo




Ksilografajoj de Mo Ce




Ruĝvertaj gruoj

Frua Printempo en norda Ĉinio





Nokta irigaciado



Ĉe ponteto en konstruejo

夫志在天下者其行必果
志在四海者其心必平
志在万物者其德必厚
志在百姓者其言必信
志在天下者其行必果
志在四海者其心必平
志在万物者其德必厚
志在百姓者其言必信

辛酉年夏月于北京地坛
[Red Seal]



辛酉年夏月
吳中書畫

[Red Seal]

LIOTERKA UNIVERZITET
KUL